


# EL POPOLA ĈINIO

1973





La tibetanoj ŝatas ekskursi en festotago

19034

GUO LIHUA

# Tibeto — Firsto de la Mondo

**T**IBETO kun areo de 1,210,000 kvadrataj kilometroj kaj ĉ. 1,200,000 loĝantoj situas ĉe la sudokcidenta landlimo de nia lando. Ĝi estas la plej alta parto de la mondo, meznombro je ĉ. 4,000 metroj alta super la mara nivelo, tial ĝi estas nomata la “firsto de la mondo”.

En la pasintaj dudek jaroj, granda ŝanĝo okazis al tiu iama “infero sur la tero”, kaj ĝi paŝis el ekstreme reakcia, malluma, kruela kaj barbara socio de feŭda servuta sistemo en novan periodon de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.


## VASTA FEKUNDA TERO

Homoj kiuj ne konas Tibeton ofte imagas al si, ke ĝi estas loko malvarma kaj dezerta kun neĝ-montoj kaj herbejoj. Cirkulis eĉ onidiro, ke ĝi estas dezertejo kie “vento ĉien ŝtonojn pelas, herboj monte ne aperas”. Tamen, Tibeto efektive estas loko abunda je naturaj riĉfontoj.

La Tibeta Altebenejo estas vasta kaj bela. Tie troviĝas altaj montoj, grandaj riveroj, primitivaj arbaroj kaj vastaj stepoj kun verdaj tapiŝosimilaj herbejoj. La giganta Ĝomolangma, la plej

alta monto en la mondo, tutjare kovrata de neĝo brilas blindige. Ĝi estas unu el la mirindaj vidindaĵoj sur la tero. La torenta Jalucangpo estas la plej alta rivero de la mondo. La riveroj Ginŝa, Lancang, Nugiang, Lasa, Nianĉu, Kongkjue kaj Ŝikjuan kaj lagoj de diversaj grandecoj kune formis abundan akvan riĉfonton por Tibeto.

La klimato de la altebenejo ĝenerale estas seka kaj malvarma. Mallonga estas la senprujna periodo kaj granda la temperatura diferenco inter tago kaj nokto. Tamen ankaŭ diferencaj estas la klimatoj de la diversaj partoj de Tibeto. En ĝia suda valo, la grundo estas fekunda kaj la klimato varma kaj humida, kiuj konvenas al kreskado de sekalo, tritiko, rizo, legomoj kaj fruktoj. Kiam la vastan stepon de norda Tibeto ankoraŭ regas frostoj, en Linĉi, Bome, Jadong kaj aliaj lokoj en la malsupra baseno de Jalucangpo jam pompas floroj kaj kamparanoj jam sin okupas pri plugado kaj semado. Tie abundas sunbrilo kaj pluvo, kiuj provizas favorajn kondiĉojn por kreskado de grenplantoj, kaj oni povas akiri du aŭ tri rikoltojn en ĉiu jaro. Pro tio tiu regiono estas nomata la “grenejo



la Partio praktikas politikon de respekto al la libereco de religia kredo kaj protektas ĉiujn religiulojn kiuj estas patriotaj kaj leĝo-observemaj.

### MALAPERIS LA NUBOJ, BRILAS LA SUNO

Antaŭ la liberiĝo, Tibeto estis infero sur la tero. Sub la malluma regado de la feŭda servuta sistemo, tiu riĉa regiono ne povis esti ekspluatata kaj la ekonomio de la tuta Tibeto estis tre mizera kaj postiĝinta; ne nur la saĝo kaj kreivo de la laboranta popolo ne povis plene disvolviĝi, sed la popolo estis senigita je la vivraĵto.

Tiun surteran inferon superregis la lokaj feŭdaj regantoj, superaj regantoj de la temploj kaj nobeloj kun Dalai-lamao kiel la ĉefo, kiuj konsistigas nur malpli ol kvin centonojn de la loĝantaro. Tiuj tri grupoj konataj kiel “la tri posedantoj” formas unu tuton, kiu posedas ĉiom da tero de Tibeto kaj la plejparton de la riĉaĵoj kaj ĉiujn servutulojn kaj sklavojn. Tio estas bone spegulita en jena popolokanto:

de Tibeto”. En la basenoj de la riveroj Nugiang, Lancang kaj Ginŝa abundas arbaroj. Kaj en la altaj montaroj sin kaŝas riĉaj mineralaj fontoj de karbo, fero, kupro, aluminio, gipso, agato, kristalo ktp. Tibeto abunde produktas ankaŭ junajn cervokornojn, moskojn, fritilarion kaj aliajn valorajn drogojn.

Tibeto havas belajn montojn kaj riverojn kaj abundon da riĉfontoj, sed en la pasinteco, ĝia reakcia servuta sistemo alportis al la popolanoj nur malsaton, mizeron kaj morton.

La tibetanoj estas unu el la naciecoj de Ĉinio kun longa historio. En multaj verkoj de historia literaturo oni povas vidi, ke la tibetaj popolanoj akumulis riĉan sperton dum sia longa produkta laborado. Tiel en arkitekturo, skulptado kaj pentrado kiel en metiartoj ili montris brilan saĝon kaj eminentajn talentojn. Frue jam en la sepa jarcento, ili jam kreis la tibetan lingvon. Dum la periodo de la deka ĝis la deksepa jarcento, sufiĉe prosperis la tibeta kulturo. La tibetanoj, ĉu viroj aŭ virinoj junaj kaj maljunaj, ĉiuj estas lertaj en kantado kaj dancado. La tibetanoj ĝenerale kredas budhismon. Post la liberiĝo,

*Ĉie kie sunradioj brilas  
estas tero de l' tri posedantoj,  
ĉie kie la riveroj iras  
estas tero de l' tri posedantoj,  
ĉie kien sin montombro tiras  
estas tero de l' tri posedantoj;  
ĉien serĉe l' servutuloj iras,  
eĉ ne trovis lokon por la plandoj.*

La vastaj amasoj de servutuloj kaj sklavo estis rigardataj kiel “brutoj parolpovaj” kaj estis laŭvole ekspluatataj, subpremataj, vendataj kaj buĉataj de la tri posedantoj. Ili penlaboris kiel brutoj, sed pli ol 70 procentoj de iliaj laboraj fruktoj devis esti liveritaj al la servutulaj mastroj. Ili havis nenian liberon. Kiam infano naskiĝis al ili, ili devis pagi naskiĝan imposton al la mastro kaj registrigi ĝin kiel posedaĵojn de la mastro, simile al aĉetita bruto. Kiam la infano plenkreskiĝis, li devis servi sklave al la mastro sur lia tero aŭ en lia domo. Kiam li fariĝis pli ol sesdekjara kaj tiel malfortiĝis, ke li ne plu povis plenumi sklavajn servojn al la mastro, ĉiujare li devis pagi imposton pro neservo. Cirkulis popolokanto: “Impostoj multas kiel bovaj haroj, pagendaj ĝis

la morto jar' post jaro." Simile al vipuroj, la tri posedantoj ĉirkaŭpremis la servutulojn per diversaj rentoj, servoj kaj uzuroj, ĝis elĉerpiĝo de ilia medolo. Sole el sia bieno ĉe Najkjong kun 67 servutuloj, la tibeta nobelo Tangĝag ekspluatis ĉiujare 63 tunojn da greno kiel renton, t.e. ĉiu servutulo juna aŭ maljuna devis pagi meznombro 938 kilogramojn.

Antaŭ la liberiĝo, la servutuloj vivis mizerege. Familio kun kvin membroj devis kunpreme loĝi en tre malgranda bovbara tendo. Ili havis preskaŭ neniun alian instrumenton necesan por ĉiutaga vivo krom difektitaj fera kaldrono, lignaj bovloj, sitelo kaj tranĉileto. Tiam ili priskribis sian mizeran vivon per jenaj vortoj: "Tio kion ni povas kunporti estas nur nia ombro, tio kion ni povas postlasi estas nur niaj piedsignoj."

Pro kruela persekutado fare de la tri posedantoj, dekmiloj da servutuloj kaj sklavoj ĉiujare estis buĉitaj, enkarcerigitaj, ekzilitaj aŭ devigitaj forfuĝi, sekve de kio dezertiĝis kampoj, malprosperis produktado kaj akute reduktiĝis la loĝantaro, tiel ke la tibeta nacieco venis al la rando de pereco.

En tiuj mallumaj jaroj, la miliono da servutuloj tage kaj nokte sopiradis, ke Prezidanto Maŭ, la savanto de ĉiuj naciecoj, ilin liberigu el la abismo de suferoj.

En la jaro 1951, la Centra Popola Registaro kaj la Tibeta Loka Registaro subskribis interkonsenton pri paca liberiĝo de Tibeto. Poste, la Popola Liberiga Armeo marŝis en Tibeton, forpelis imperisismajn fortojn kaj havigis al la tibeta popolo pacan liberigon. Efektivigi socian reformon kaj iri socia-

lisman vojon estas la komuna postulo de la diversnaciecaj popolanoj de nia lando. Sed pro tio, ke malsamaj estas la disvolviĝaj statoj de la naciecoj de nia lando, ankaŭ la tempo, proceso kaj maniero de socia reformo devas esti diferencaj. Tial, la interkonsento pri paca liberiĝo de Tibeto certigas la neceson de socia reformo en Tibeto kaj montras samtempe, ke la tibeta loka registaro devas mem fari socian reformon kaj kiam la popolo elmetos postulon pri tia reformo, ĝi devas solvi la problemon per interkonsiliĝo kun la personoj de la tibeta supera socitavolo. La politiko de paca reformo de la Centra Komitato de la Partio plene konsideris la specifan disvolviĝan staton de la tibeta nacieco.

Post la paca liberiĝo de Tibeto, la Kompartio kaj la Centra Popola Registaro ĉiam persistis en efektivigo de la politiko de klopodo por unueco de la patrolando, solidareco de la naciecoj, egaleco de ili kaj paŝo-post-paŝa nacieca aŭtonomiigo kaj socia reformo, firme observante la interkonsenton de paca liberiĝo de Tibeto. Dank' al subtenado de la frataj naciecoj en internaj regionoj, la konstruaj aferoj de Tibeto ricevis certan disvolviĝon. Sed la reakcia regantaro de Tibeto, kun Dalajlamao kiel la ĉefo, komplotadis en koluzio kun imperiistoj kaj eksterlandaj reakciuloj kun la vana espero ankoraŭ kruele sklavigi kaj ekspluati la tibetajn popolanojn. Tial ili ne volis akcepti la pacan liberigon de Tibeto, firme oponis kontraŭ socia reformo en Tibeto kaj eĉ malhelpis kaj subfosis ĉiun ajn bonfaron de la Partio al la tibeta popolo. Precipe vidinte ke la nacia politiko de la Partio tagon post tago enpro-



*Antaŭ plugado*




*Tibeta arbosegisto*

fundigis en la koron de la tibetaj popoloj kaj la politika konscio de la vastaj tibetaj amasoj senĉese altiĝis, ke ili urĝe postulis socian reformon, la reakcia regantaro kun Dalai-lamao kiel la ĉefo faris kontraŭrevolucion armitan ribelon en marto de 1959, en koluzio kun imperiistoj kaj eksterlandaj reakciuloj, por konservi la feŭdan servutan sistemon. Ĉie kien la ribeluloj atingis, ili murdis, rabis, perfortis kaj bruligis loĝejojn. Ili ne nur tre izoligis de la tibeta popolo, sed ankaŭ ne ricevis subtenon de la patriotoj de la supera socitavolo de Tibeto. La ribelo incitita de tiu ĉi plenmano da reakciuloj estis rapide estingita de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la tibeta popolo. La ĉefo de la ribeluloj Dalai-lamao fuĝis eksterlanden kaj fariĝis nacioperfidulo. Post la estingo de la ribelo, la miliono da servutuloj kaj sklavoj sub la gvido de la Komunista Partio faris demokratian reformon de abolo de sklavaj servoj kaj persona dependeco, redukto de terrento kaj interezo kaj agrara reformo, kaj ĝisfunde detruis la feŭdan servutan sistemon. De tiam la miliono da servutuloj de Tibeto fariĝis veraj mastroj. En septembro de 1965, efektiviĝis nacieca aŭtonomio en Tibeto kaj fondiĝis la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

*Geknaboj de mezlernejo faras gimnastikon.*





*Strato de Lasao*

## KONSTRUADO DE NOVA TIBETO

Post fundamenta plenumo de demokratia reformo en 1959, la liberigitaj servutuloj faris socialisman revolucion kaj socialisman reformon al agrokulturo kaj paŝtado en konvena tempo. Nun 62 procentoj de la vilaĝoj de Tibeto jam starigis popolan komunumon. La agrokulturo kaj paŝtado tiel de interhelpaj grupoj kiel de popolaj komunumoj akiris riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj. La totala produktokvanto de greno kaj la nombro de brutoj de 1970 kreskis je ĉ. cent procentoj kompare kun tiuj de 1958, la jaro kiam ankoraŭ ne efektiviĝis demokratia reformo; kaj tiuj de 1971 denove pliiĝis rimarkinde. En la pasinteco, ĝia pomua produktokvanto de greno estis tre malalta, nome maksimume 80 kilogramoj po muo. Nun, la meznombra pomua produktokvanto de greno de la gubernioj Caju, Meto kaj Pulan kaj dekoj da komunumoj jam atingis pli ol 210 kilogramojn. Liemaj de Lunze-gubernio estis malriĉa loko en montaro. Sub la gvido de la partia organizo, la tieaj popolanoj konstruis, post la fondiĝo de popola komunumo, irigaciajn kanalojn kaj deklivajn kampojn sur montoj je pli ol 4,200 metroj super la mara nivelo kaj multe altigis la produkton de greno. La totala produktokvanto de greno de 1971 kreskis je pli ol centprocentoj kompare kun tiu de 1959, kaj tiu komunumo fariĝis avangarda unuo de Tibeto en lernado de Daĝaj.

Antaŭ la liberiĝo, Tibeto ne povis produkti ŝraŭbon kaj eĉ alumetoj estis enportitaj. Nun

industrio aperis kaj disvolviĝas senĉese. Fondiĝis pli ol ducent mezgrandaj kaj malgrandaj fabrikoj kaj minejoj de dekoj da industria branĉoj kiaj karbo, elektro, metalurgio, maŝinfabriko, forstkulturo, kemio, cemento, ledo, lanŝpinado, alumeto, papero, presado kaj sukero. Ankaŭ institucioj por meteologia kaj scienca esplorado estis starigitaj. Lasao, Linĉi kaj Ĉamdo fariĝis industria bazo sur la Tibeta Altebenejo; ankaŭ en la subregionoj Ŝannan, Ŝkaze kaj Nagĉu starigis fabrikoj servantaj rekte al agrokulturo, paŝtado kaj popola vivo. Kvindek procentoj de la gubernio jam havas malgrandajn hidroelektrajn kaj multaj liberigitaj servutuloj, kies prapatroj uzadis olean lampon de generacio al generacio, ekhavis elektran lampon. Geologiaj laborantoj jam trovis tie dekojn da specoj de utilaj mineraloj.

Antaŭ la liberiĝo, en Tibeto troviĝis neniu aŭtovojo. Nun en tiu regiono jam estas 8 trunkaj linioj kaj pli ol 70 branĉaj linioj kun totala longeco de 16,000 kilometroj, kiuj fundamente formis aŭtovojan reton kun Lasao kiel la centro. La funkciado de la trunkaj linioj Siĉuan-Tibeta kaj Kinghaj-Tibeta ŝanĝis la fermecon de Tibeto kaj forte akcelis ĝian socialisman konstruadon.

Nun ĉ. 20,000 tibetaj kadroj laboras sur diversaj gvidaj postenoj en tiu regiono. La unua generacio de tibetaj laboristoj senĉese kreskas. Nemalmultaj kadroj, oficistoj, kamparanoj kaj paŝtistoj fariĝis gloraj membroj de la Komunista Partio de Ĉi-

nio. Ili firme iras la socialisman vojon kun la miliono da liberigitaj servutuloj kaj ludis gravan rolon en la konstruado de socialisma nova Tibeto.

## NOVA VIVO DE LA LIBERIGITAJ SERVUTULOJ

De multaj jarcentoj, Tibeto estis “malpermesita loko” de moderna kulturo kaj scienco. Antaŭ la liberiĝo, tie troviĝis nur du lernejoj por kulturi monaĥajn kaj laikajn oficistojn por la reacia registaro de Tibeto, dum la miliono da servutuloj tute ne havis rajton viziti lernejon. La servutuloj kaj sklavo subpremataj de la feŭda servuta sistemo kaj katenata de superstiĉoj dronis en malklereco de jarcento al jarcento. Hodiaŭ la liberigitaj servutuloj jam havas siajn unuajn klerulojn kaj sciencajn kaj teknikajn laborantojn. En la regiono fondiĝis 7 mezlernejoj kaj krome ankaŭ nacia instituto por elkulturi tibetajn kadrojn, kaj specialaj lernejoj por elkulturi instruistojn kaj kuracistojn. Nun pli ol 83,000 personoj lernas en ili, nome 30-oble kiom en la jaro 1958. En la lastaj du jaroj, ĉ. mil gefiloj de liberigitaj tibetaj kaj alinaciecaj servutuloj estas senditaj al Pekino, Hi-an kaj aliaj urboj por studi en altaj lernejoj. En popolaj komunumoj, kies membroj loĝas fore unuj de aliaj, fondiĝis “migrantaj elementaj lernejoj”, kies instruistoj iras regule de loko al loko por doni lecionojn al la geknaboj, por ke ĉiuj lernaĝaj infanoj povu ricevi edukadon.

Antaŭ la liberiĝo, la higiena afero en Tibeto estis tre postiĝinta. En la tuta regiono estis nur du kuracejoj servantaj al la reaciaj regantoj.

La vastaj amasoj de servutuloj tute ne povis ĝui kuracadon kaj devis lasi malsanojn forrabi ilian vivon. Post la Liberiĝo, la ŝtato transpostenigis medicinajn laborantojn el internaj lokoj de la lando de tempo al tempo, kaj ankaŭ nombro da ĉeloke elkulturitaj tibetaj kuracistoj komencis labori. Multaj han-aj medicinaj laborantoj venintaj en Tibeto por subteni ĝian konstruadon venkis multajn malfacilojn kune kun siaj tibetaj kamaradoj kaj starigis sur la firsto de la mondo sanprotektan reton. Hodiaŭ, popola hospitalo aŭ kuracejo jam estas fondita en la regiono, subregionaj aŭ guberniaj urboj kaj nombro da postlaboraj kuracistoj estas elkulturitaj. Ĉiuj tibetaj popolanoj povas ĝui senpagan kuracon.

Kun la disvolviĝo de la produktado, la vivo de la terkulturistoj kaj paŝtistoj boniĝas jaron post jaro. La prezoj de la varoj estas stabilaj, la aĉetpovo de popolo ĉiam pli altiĝas kaj pli kaj pli multaj homoj havas superfluan monon por meti en ŝparkason. La totala deponita sumo de la regiono en 1971 kreskis je 32 procentoj kompare kun tiu en 1965 antaŭ la kultura revolucio kaj je kvinoblo kompare kun tiu en 1958 antaŭ la demokratia reformo.

Kiu travivis frostan vintron, plej bone sentas la varmon de la suno; kiu plej multe suferis ekspluaton, plej amas la Komunistan Partion. Komparante la pasintecon kun la hodiaŭa, la miliono da liberigitaj servutuloj kantas plengorĝe:

*Ho, Himalajo, mont' giganta,  
ho, Jalucangpo galopanta,  
neniam ni forgesos la favoron grandan  
de Prezidanto Maŭ, nia savanto.*



*Angulo de la Lasaa  
Popola Parko*



# Antaŭe Servutuloj, Hodiaŭ Mastroj

—Vizito al laborulaj familioj en Bagiaŭ-strato de Lasao

**L**ASAO estas antikva urbo sur la Tibeta Altebenejo de nia lando. En ĝia centro sin trovas Bagiaŭ-strato, kiu ĉirkaŭas la famkonatan Daĝaŭ-templon.

En la feŭda servuta socio, en la orienta Bagiaŭ-strato loĝis iu granda tibeta mastrosinjoro; en la okcidenta sidis la oficejo de la antaŭa loka registaro de Tibeto; en la norda lokiĝis malliberejo de la nomita registaro; kaj en la suda sin trovis placo, kie Dalai-lamao, la ĉefo de tibetaj naciperfiduloj, kaj liaj sekvantoj persekutis la popolanojn. Tie diboĉis la regantaj klasoj kaj mizere vivis la laborantaj popolanoj kiel brutoj.

La ŝtormo de la demokratia reformo ŝanĝis Bagiaŭ-straton kaj havigis al ĝi novan fizionomion. Ekstariĝis pli ol 1,500 tie loĝantaj laboruloj, kiuj antaŭe sate suferis subpremadon kaj ekspluatadon de la reakcia loka registaro, nobeloj kaj temploj de Tibeto.

Lastatempe ni vizitis kelkajn familiojn de Bagiaŭ-strato. Inter la vizitatoj estis antaŭe tajloroj, ferajistoj kaj servistoj. En la feŭda servuta sistemo ili estis servutuloj, t.n. "plebanoj" difinitaj de la leĝo de la antaŭa loka registaro de Tibeto. Sub la saĝa gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la servutuloj de la malnova socio fariĝis hodiaŭ mastroj de la nova epoko.

*Danzengvanggiu (la tria de dekstre) kaj liaj familianoj en libera tago*



## LA PASINTECO KAJ HODIAŬO DE TAJLORA FAMILIO

En la korto n-ro 3 en la sudokcidenta strateto de Bagiaŭ loĝas familio de Danzengvanggiu. En la malnova socio li estis sklavo de la granda mastrosinjoro Lalu Cevangduogi kaj pleba tajloro. Lia edzino Gala laboris kiel servutulino de la granda mastrosinjoro Ĵaŭhi Zejenĝuoma.

Tuj post sia naskiĝo Danzengvanggiu jam estis sklavo de Lalu. Kiam li estis 19-jara, Lalu vendis lin al la alia mastrosinjoro Duoĝen. Rimarkinte ke li estis lerta kaj saĝa, la nova mastro lasis lin lerni tajloradon. De tiam li tajloris, kaj lavis pispoton kaj manĝigis ĉevalojn. En sia aĝo de 24 jaroj li edziĝis kun Gala, la servutulino de Ĵaŭhi, kaj en la sekvanta jaro la edzino naskis filon, kiu nomiĝas Luosanghijaŭ. Poste ŝi naskis ankaŭ tri infanojn. En la malnova Tibeto, laŭ la difino de la regantoj, iliaj gefiloj kiel denaskaj sklavoj kaj servutulinaj apartenis al la du mastroj.

Danzengvanggiu laboris ĉiutage de mateno ĝis vespero, tamen la mastrosinjoro donis al li nur 0.1 kilogramon da sekalfarunaĵo, kiu ne povis satigi eĉ unu personon. Malgranda Luosanghijaŭ devis almozpeti ĉiutage kune kun siaj gefratoj. Tiam Danzengvanggiu jam fariĝis lerta tajloro. Oni ne atendis, ke lia tekniko alportis al li novan

katastrofon. Ĝuste en oktobro de tiu jaro, kiam la mastrosinjoro deklaris lin oficiala tajloro, la loka registaro de Tibeto venigis lin al la oficejo kaj diris al li: "Laŭ difino de la registaro unu tajloro devas pagi imposton de 12 arĝentaj dolaroj en oktobro de ĉiu jaro." Ĉar Danzengvanggiu ĉiutage enspezis nur 0.1 kilogramon da sekalfarunaĵo, li ne povis pagi tiel pezan imposton. "Se vi ne povas pagi imposton, vi devas esti punita per vangfrapoj laŭ la difino." diris la registara oficisto. Kaj kelkaj tibetaj soldatoj ligis liajn manojn sur lia dorso. Li estis punita je 240 vangfrapoj kaj liaj vangoj forte ŝveliĝis kaj la oreloj surdiĝis. Ekde tiam, en oktobro de ĉiu jaro li estis venigita al la loka registaro kaj revenis hejmen kun vundoj.

Post la demokratia reformo de Tibeto en 1959, same kiel la aliaj servutuloj, familianoj de Danzengvanggiu liberiĝis. En la demokratia reformo la popola registaro atribuis al li domon kun du ĉambroj, tiel ke liaj familianoj, kiuj de generacioj loĝis en humida kaj malhela ĉevalstalo, ekhavis helan kaj varman hejmon.

Nun, Danzengvanggiu estas laboristo de Lihin-a Ŝua kaj Tajlorada Kooperativo en Lasao, kaj lia edzino laboristino de Lihin-a Vermiĉela Prilabora Kooperativo. Lia pliaĝa filo Luosanghijaŭ estis sendita de la popola registaro al la Tibeta Nacia Instituto, tie lernis 7 jarojn kaj aliĝis al la



*Bagiaŭ-strato*

*Infanoj lernas en elementa lernejo funkciigata de la loĝantaro de Bagiaŭ-strato.*



Komunisma Junulara Ligo. Nun li estas kadro de la politika sekcio de iu trupo de ĈPLA garnizonanta en Tibeto kaj lia edzino Kiangba Bajma estas kadrino de Gianhin-administracio de Ĉengguan-kvartalo de Lasao. Ili jam havas trimonatan infanon. La pliaĝa filino Kiangba kaj la dua filino Jangginĝuoga estas barbirinoj en la Ŝtata Serva Kompanio. La dua filo Junden laboras en la fabriko de iu trupo. La tria filo Kjongda lernas en la Lasa-a Mezlernejo. La tria filino Dava kaj kvara fileto Habacijen lernas en elementa lernejo. El la 11 familianoj de Danzengvanggiu 7 havas sian laboron.

Sate suferinta Danzengvanggiu tre amas hodiaŭan feliĉan vivon. Li ofte diris al siaj gefiloj: “Miaj infanoj, trinkante dolĉan buteran teon, portante sur vi novajn vestojn kaj loĝante en hela domo, vi ne forgesu, ke tio estas donita de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ.”

#### NOVA VIVO DE FERAĴISTOJ

Sur la okcidenta Bagiaŭ-strato troviĝas Lihin-a Feraĵa Kooperativo, en kiu laboras Bangjuegiebu. Lia patro Laba estis feraĵisto. Ekde sia aĝo de

6 jaroj, li laboris kiel servisto de mastrosinjoro. Poste li lernis de la patro la teknikon. En la malnova Tibeto la reakciaj regantoj nomis ilin “nigraostuloj” de du generacioj. Tamen hodiaŭ la sama Bangjuegiebu estas intime nomata feraĵisto-majstro.

Menciante pri tio, li emocie diris: “En la malnova socio ni feraĵistoj havis nenian personan liberon, tamen hodiaŭ ni estas laboristoj respektataj; en la pasinteco ni neniam nin satigis, tamen hodiaŭ mi ne nur havas sufiĉe da manĝaĵo kaj vestaĵo, sed ankaŭ iras al laboro per biciklo; en la malnova socio mi dufoje estis senkaŭze ĵetita en malliberejon kaj portis sur la brakoj katenojn, tamen hodiaŭ mi portas sur la brako horloĝon. Komparante la novan socion kun la malnova kaj rememorante la teruran tragedion de ni feraĵistoj en la servuta sistemo mi sentas, ke mi havas neelĉerpeblan forton por konstrui socialismon.”

En la konstruado de la socialisma nova Tibeto Bangjuegiebu klopodis disvolvi sian teknikon. En 1960 li partoprenis en la Feraĵa Interhelpa Grupo Lihin, kiu poste fariĝis feraĵprodukta kooperativo. En 1964 li estis sendita al konstruejo de iu trupo.

Kiam finiĝis la laboro, li estis premiita de la trupo pro sia diligenteco kaj alta tekniko. En 1966 li iris al la malproksima Motuo-gubernio por helpi menba-naciecajn fratojn konstrui ponton. Pro sia penega kaj aktiva laboro li elektiĝis kiel aktivulo. En la lastaj jaroj li 9-foje estis premiita de la Partio kaj la popola registaro.

La filo senĉese progresas, kaj ankaŭ la patro ne postiĝas. Laba, kiu ne povis sin vivteni en la malnova socio, fariĝis nun avangardulo de la Lasa-Agrikulturila Fabriko "la Unua de Julio" kaj glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en 1961. Li dufoje venis al Pekino kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

## FELIĈA MALJUNULINO

Kiam ni vizitis 76-jaran maljunan vidvinon Cila en ŝia hejmo de la sudokcidenta strateto de Bagiaŭ, ŝi diris ĝoje: "Eĉ en sonĝo mi ne imagis, ke mi povas vivi tiel feliĉe. Mi ja ŝuldas mian hodiaŭon al la Partio kaj Prezidanto Maŭ."

En la damninda feŭda servuta sistemo onklino Cila laboris kiel servistino de mastrosinjoro pli

ol 30 jarojn. Post tiel longa turmentado, ŝi fariĝis malsana kaj malforta kaj fine ŝi devis en ĉifonaj vestoj almozpeti por vivteno. Post la demokratia reformo, la Partio kaj popola registaro ĉiel zorgis pri la tibeta popolo, precipe la senhelpaj orfoj kaj maljunuloj.

Onklino Cila diris al ni: "En la malnova socio senhelpaj malriĉuloj, kiel mi, nur povis atendi morton, eĉ pri tio neniu zorgis. Nun la registaro kaj najbaroj multe min helpas, kaj kadroj de la kvartala administracio ofte donas al mi zorgon. Krome, ĉiumonate la ŝtato senpage provizas min per sekalfarunaĵo, butero, teo, salo kaj venigas al mi kuraciston, kiam mi malsaniĝas." En la fino ŝi emocie diris: "Estas la Partio kaj registaro, kiuj donis al mi feliĉan vivon!"

15 familioj de senhelpaj maljunuloj kaj orfoj sur Bagiaŭ-strato, same kiel onklino Cila, hodiaŭ ĝuas ĉiuflankan helpon de la ŝtato kaj vivas en feliĉo.

Ŝanĝiĝis Bagiaŭ-strato. La antaŭaj servutuloj de Bagiaŭ-strato nun fariĝis konstruantoj de la nova Tibeto.

*Konsuma kooperativo por loĝantoj sur Bagiaŭ-strato*



ĜANG ĜIVEJ:

# Sur la Granda Vojo



*Serpentuma kanalo longa je 8.5 km. sur Mola-monto 4,500 metrojn alta super la mara nivelo.*

**L**IEMAJ, ordinara subdistrikto de Lunze-gubernio, kuŝas sur la Tibeta Altebenejo, je 3,800 metroj super la marnivelo. Rimarkindaj ŝanĝoj okazis ĉi tie post la demokratia reformo en la jaro 1959 kaj precipe post la fondiĝo de la popola komunumo en la jaro 1966. Nun ĝi jam fariĝis ruĝa flago sur la Tibeta Altebenejo en lernado de Daĝaj en agrikulturo.

En Liemaj altas montoj, profundas valoj kaj malmultas agroj, mankis al ĝi grenoj, akvo kaj herboj. En la reakcia kaj barbara feŭda servuta socio, kiel parolpovaj brutoj la servutuloj suferis ekstreme kruelan sklavigon kaj persekutadon. Dum la 40-50 jaroj antaŭ 1959, el la 183 laborulaj familioj 55 homoj devis forfuĝi, 18 mortis pro torturado de la kruelaj mastrosinjoroj kaj 28 mortis pro malsato. Ekzemple, la filo de servutulo Cijencuomu devis servi en templo kiel sklaveto, kiam li estis nur ok-jara knabo. Ĉiutage li ne povis sin satigi, tamen li devis fari pezan laboron. Foje pro netolerebla malsatego li ŝtele prenis buŝojn da sekalfarunaĵo kaj pro tio li estis solide draŝita kaj poste ĵetita en subteran karceron. Dum preskaŭ kvin tagoj, li ne ricevis manĝaĵon de la mastro kaj tiel li mortis en ĝi.

En la jaro 1951 Tibeto pace liberiĝis. Tamen la miliono da servutuloj vere liberiĝis kaj fariĝis mastroj nur post kiam la feŭda servuta sistemo estis komplete eliminata en la demokratia reformo farita en la jaro 1959. Kuraĝigate de la demokratia reformo, la loĝantoj de Liemaj pli aktiviĝis en iro de la socialisma vojo kaj organizis interhelppajn grupojn. Por frue suriri la vojnon de komuna feliĉo Ĵenzengvanggie, sekretario de la partia filio de Liemaj-subdistrikto, speciale vizitis popolajn komunumojn de Najdong-gubernio en novembro, 1965, kaj prezentis post reveno al ili la superecojn de popolkomunumo. En la fino de tiu jaro, la 21 interhelppaj grupoj de la tuta subdistrikto estis kunligitaj en ses grupojn, tiel ke kreiĝis favoraj kondiĉoj por starigi popolkomunumon. En vintro de 1966, Liemaj-popolkomunumo naskiĝis. Observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ "reformi Ĉinion kun la spirito de monttranslokigo fare de Malsaĝa Avo", ili faris montohakadon por konstrui kanalojn kaj kulturebligon de virga tero kaj iom post iom ŝanĝis la malriĉan kaj postĝintan fizionomion de la loko en la movado "lerni de Daĝaj en agrikulturo". La hodiaŭa Liemaj, kiun ni vizitis, jam estas tute nova prospera socialisma kamparo.


En la jaro 1959, Liemaj-subdistrikto havis nur 79 hektarojn da agro, sed nun 153.7 hektarojn; la totala produktkvanto de greno en 1971 atingis pli ol 360,000 kilogramojn, je 118% pli multe kompare kun tiu en 1959; nun ĝi posedas pli ol 10,000 diversajn brutojn kaj pliiĝis je 1.5-oblo kompare kun tiu en 1959. Kun la disvolviĝo de la kolektiva produkto ankaŭ la enspezo de la komunumanoj senĉese plimultiĝas kaj ilia vivnivelo leviĝas tagon post tago. Nun pli ol 70 procentoj de la 216 familioj de la tuta popolkomunumo havas sian deponon en bankoj kaj ĝia totala sumo atingis 27,000 juanojn. Antaŭe la legoscias homoj okupis nur 3.7% de la loĝantaro de la tuta subdistrikto. Hodiaŭ pli ol 90 procentoj de la lernoagaj geknaboj lernas en la kvar elementaj lernejoj fonditaj en la subdistrikto. Dum kvin jaroj post sia fondiĝo, la popolkomunumo vendis al la ŝtato pli ol 270 tunojn da superbezona greno, akumulis pli ol 29,000 juanojn da komuna akumulita fonduso kaj cetere aĉetis pli ol 100 novtipajn agrikulturajn instrumentojn kaj agrikulturajn maŝinojn.

Antaŭe la loĝantoj de Liemaj havis meznombre nur po 1.5 muojn da agro. Post la demokratia reformo la liberigitaj servutuloj ricevis agron kaj ankoraŭ ekspluatis malgrandan kvanton de virga tero, kaj unuigis ilin en unu parcelon, tamen tio ne povis solvi radikale la problemon de disvolvo de la produkto. Ili opiniis ke la ĝusta vojo por disvolvi la produkton estas plivastigo de agroj kaj disvolvo de irigacio. Tial ili decidis ekspluati Sangkin-ebenaĵon, kiu kuŝas sur Mola-monto

en la meza parto de Liemaj-subdistrikto kaj kie troviĝas granda peco da ebena tero kun areo de ĉirkaŭ 67 hektaroj, kiu povas esti irigaciata per neĝakvo sur la sama monto. Tuj post kiam la plano estis elmetita, ekcirkulis superstiĉaj onidiroj: "Sangkin-ebenaĵo estas la ĉeval-paŝtejo de dioj kaj neniam devas esti tuŝita; se la dioj estus koleigitaj, tiam malfeliĉoj aperus senfine." Oni ankoraŭ diris: "La montoj Gujla kaj Mola estas sanktaj lokoj simbolantaj lumon kaj feliĉon, kie oni ne devas konstrui kanalojn, ĉar la tuta akvo enpenetros en la teron, kiam ĝi trafluos la sanktan lokon." Por venki tiun superstiĉojn, la liberigitaj servutuloj prenis la travivaĵon de maljunulo Bajsuo kiel ekzemplon. La maljunulo ĉie klopodis pruntepreni monon por aĉeti buteron kaj teon kion li portis al templo kiel oferon al dioj por ke la lastaj donu al li feliĉan vivon, sed li fariĝis pli kaj pli mizera kaj mortis pro malsatego. Rememorante ĉi tion, ili firme respondis: Ni certe liberigos nin el la spirita kateno, kaj la virga monto devas esti ekspluatita kaj la kanalo konstruita!

Sangkin-ebenaĵo kuŝas je 4,200 metroj super la marnivelo. Antaŭ longe la loĝantoj de Liemaj-subdistrikto jam volis ekspluati tiun ebenaĵon kaj ilia volo efektiviĝis nur en printempo de la jaro 1966. La batalo komenciĝis. En la loko ĉie estis ŝtonoj kaj herboj kaj la grundo estis firma, videble, la laboro por ili estis peniga kaj malfacila. Suolang, membro de la Komunista Partio, estas bona kadro, kiu tutkore laboras por la bono de la kolektivo. De kiam li prenis sur sin la taskon

### *Ŝafaro sur paŝtejo de komunumo*



gvidi la ekspluatadon de la ebenaĵo, li ĉiutage manĝis kaj dormis sur la monto kaj aperis kie troviĝis malfaciloj. La kadro marŝis antaŭen kaj strikte lin sekvis la amasoj. Ili diris fiere: La grundo estas firma, tamen pli firma estas la volo de la liberigitaj servutuloj; la ŝtonoj estas grandaj, tamen pli granda estas la revolucia entuziasmo de la Liemajanoj. Dum la daŭro de pli ol unu jaroj, ili ekspluatis ĉ. 51 hektarojn da tero, tiel ke la agroj plimultiĝis je 50%. En tiu laboro ili multe ŝvitis, ĉ. 1,000 kubmetroj da ŝtonegoj estis forportitaj kaj pli ol 280 plugiloj kaj ŝpatoj estis eluzitaj. Nun Sangkin-ebenaĵo kulturebligita de ili kun la spirito penege lukti en malfaciloj kaj sinapogante sur siaj propraj fortoj estas alinomita "revolucia ebenaĵo".

Samtempe kun la terekspluatado, oni komencis konstrui serpentuman kanalon sur la monto por solvi la problemon de irigacio. Mola-monto distancas je 8.5 kilometroj de Sangkin-ebenaĵo kaj inter ili sin trovas montaj klifoj, la plej danĝera estas Tongba-rokmuro, alta je pli ol 20 metroj kaj larĝa je 40-50 metroj, kiun la kanalo nepre devas trapasi. La nesurgrimpebla rokmuro staras ĉe profunda ravino kaj malantaŭ ĝi staras pli alta krutaĵo. Kiam la konstruata kanalo etendiĝis al Tongba-rokmuro, la viroj estis forvokitaj por urĝe ripari ŝoseon. Tiam la virinoj senhezite prenis sur sin la pezan taskon. Ili organizis sturman junulinan taĉmenton. Sub la gvido de la taĉmentestro Bajmajuĝen ili komencis la batalon, ĵurante ke ili ne descendos de sur la monto antaŭ ol ili

trahakis la rokmuron. Bajmajuĝen kaj taĉmentano Danzeng pendigis sin per ŝnuro en la aero, unu martelis kaj la alia dumane tenis la borstangon. Ili elhakis porlaboran starejon por kelkaj homoj. Ankaŭ la aliaj taĉmentanoj surgrimpis la rokmuron kaj ekhakis ŝtonojn. Ili luktadis brave kaj obstine. Kiam borstangoj estis difektitaj, ili mem riparigis ilin; al ili mankis pulvo, ili mem produktis tion. Ne timigite de la malfaciloj, la heroaj sturmaj taĉmentanoj persiste batalis dek tagojn kaj fine plenumis la taskon. En la jaro 1967, la kanalo estis finkonstruita kaj ekfunkciis. Tio estis tre ĝojinda afero por la Liemajanoj. De tiam la akvo el degelinta neĝo sur Mola-monto komencis servi al ili, donante al ili feliĉon kaj ĝojon. Kaj la antaŭa dezerteco de Mola-monto forpasis por ĉiam.

En somero, 1970, la grenplantoj de Liemajpopolkomunumo estis atakitaj de hajlo senprecedenca en la historio de ĉirkaŭ 100 jaroj. Post la hajlo sekvis monttorentego. Tiuj katastrofoj damaĝis la grenplantojn de 87 el la 154 hektaroj da tero de la tuta popolkomunumo. Sed la komunumanoj pluapase disvolvis la revolucian spiriton de la Daĝajanoj kaj venkis la naturajn katastrofojn dank' al la supereco de popolkomunumo. Tiujare la totala produktokvanto de greno de la komunumo neniom reduktiĝis kompare kun tiu de 1969 kaj la nombro de brutoj kreskis je 14%.

*Kolza kampo de la "revolucia ebenaĵo"*



La sukcesoj gajnitaj de Liemaj-popolkomunumo estas nedisigeblaj de la gvido de la partia filio de la komunumo kaj la modela ago de ĝia sekretario Ĵenzengvanggie. La plej granda malfacilo renkontita de ili estis nesufiĉo de sterko en la unua jaro post la fondiĝo de la komunumo. En tiuj cirkonstancoj Ĵenzengvanggie la unua prenis korbbon kaj ĉiamaniere klopodis kolekti fekaĵojn, lamante per la kruroj kripligitaj de mastrosinjoro. Li ĉiam prenis sur sin la plej malfacilan kaj plej danĝeran laboron en la tagoj kaj noktoj, kiam ili batalis kontraŭ la virga monto. Estis li, kiu la unua surgrimis krutan rokmuron por haki ŝtonojn, kiam la batalo komenciĝis sur la danĝera Hiaŭluoguo-krutaĵo. Estis li, kiu jen batalis sur kampoj en rivero kaj ŝtuparaj kampoj, jen laboregis sur Sangkin-ebenaĵo. Liaj heroaj faroj donis al la komunumanoj grandan kuraĝigon kaj edukon kaj la libe-

rigitaj servutuloj laŭdis ke li estas bona gvidisto de socialismo.

Liemaj-popolkomunumo nun jam fariĝis progresinta kolektivo en lernado de Daĝaj en agrikulturo sur la Tibeta Altebenejo. Sed ili esprimis, ke ili klopodos gajni novajn venkojn sur la vojo de daŭra revolucio. Por pliprodukti grenon la komunumanoj multege laboris por fari ŝtuparajn kampojn kaj plibonigi la grundon en la vintro de 1971 malgraŭ frostoj kaj neĝblovo. Ĝis printempo de la jaro 1972 ili jam konstruis 7 hektarojn da ŝtuparaj kampoj kaj plibonigis 6.6 hektarojn da malaltproduktaj kampoj kaj per tio metis la bazon por gajni riĉan rikolton en la jaro. Pli bela perspektivo kuraĝigas la popolanojn de Liemaj marŝi kaj batali senĉese kaj senlace.

### *Mantraktoro de la komunumo*






# La Familio de Avang



La familio de Avang



Lia tuta familio sub la  
jugo de la antaŭa  
feŭda servuta sistemo

Avang, ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Kajsong-popolkomunumo, Najdong-gubernio, Tibeta Aŭtonoma Regiono, travivis siajn 54 jarojn en la socioj malnova kaj nova, kaj ankaŭ lia familio spertis grandan ŝanĝigon.

Lia hejmloko situas en la fekunda Ŝannan-regiono sude en Tibeto. Sub la damninda feŭda servuta sistemo, de kiam li naskiĝis, li, same kiel lia patro, fariĝis servutulo de tibeta granda mastrosinjoro Suokang Vangkinggele. Tiam Ŝannan-

regiono estis regata de la reakcia loka registaro, temploj kaj nobeloj, kiuj posedis ĉiujn agrojn, brutojn kaj produktilojn kaj kruele ekspluatis kaj subpremadis siajn servutulojn. De sia ok-jara aĝo, Avang jam kune kun sia patro laboris por la mastrosinjoro. Ĉiutage ili povis akiri nur po unu litron da sekalfarunaĵo kaj devis dormi en staloj. Nur en ĉiu tria aŭ kvara jaro la mastrosinjoro donis al li unu veston el kruda ŝtofo, kiun ili portis tage kaj uzis kiel litkovrilon nokte. Pro la ekspluatado kaj persekutado de la mastro-

Avang (*maldekstre*) kaj Jijencima, partia sekretario de Kajsong-komunumo interkonsiliĝas pri laboro.



sinjoro, lia plejaĝa filino malsaniĝis je neŭrozo. Pro manko de mono, li ne povis ŝin kuracigi. Kaj liaj du aliaj infanoj devigite ĉie almozpetis, tiel ke la familio de Avang dronis en senelirejo.

Post la liberiĝo de Tibeto, la familio de Avang komencis sian novan vivon. Kaj post la venko de la demokratia reformo, li kaj liaj familianoj, kiel la aliaj liberigitaj servutuloj de Tibeto, estis liberigitaj en politiko kaj fariĝis mastroj de la ŝtato. Suokang-bieno, kie laboris Avang kiel servutulo, nun fariĝis Kajsong-popolkomunumo. Sur la granda socialisma vojo, Avang jam fariĝis kadro de la komunumo kaj membro de la Komunista Partio de Ĉinio. Ok el liaj dek unu infanoj laboras sur sia respektiva posteno kontribuante sian forton por konstrui la socialisman novan Tibeton, kaj tri aliaj lernas en lernejo. Nun lia familio vivas feliĉan vivon. Avang ofte diras al aliaj kun emocio: "La pasinta kaj la nuna socioj ja estas du malsamaj mondoj."



Lia edzino Ani (*maldekstre*), servutulino en la malnova socio, nun vivas feliĉe. Jen ŝi kaj ŝiaj familianoj rigardas bildgazeton.

ĈPLA-ano Ciĝengesang (lia kvina infano) laboras kune kun komunumanoj.





La librotenistino de produkta grupo Cijenĝuoma (lia kvara infano)



Lia sesa infano Gangĝu (la unua de dekstre) estas membro de la propaganda taĉmento de la komunumo. Nun ŝi prezentas programeron por komunumanoj surkampe.



Lia oka infano Cijencanggjue estas studentino de la Tibeta Nacia Instituto. Antaŭe ŝi administris la komunuman fruktoĝardenon.

Lia plejaĝa filo  
Suolangdengĝu (*la  
unua de dekstre*)  
estas sekretario de  
la komunuma filio  
de la Komunisma  
Junulara Ligo kaj  
milita kompanies-  
tro.



La edzino de lia plejaĝa filo estas sanitaristino de la komunumo.



Lia tria infano Longĝen estas instruistino de la komunuma elementa lernejo.

Lia sepa infano Suolangvangdeng estas sendita de la komunumo al agrikultura kaj paŝta eksperimentejo por tie lerni kiel kulturi tabakon.



# La Tibeta Industrio

## Komencita de Nulo

**E**N la ŝpinteksaĵa ekspozeejo de la Printempa Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj en 1971, foto pri ŝpinteksistinoj sur la Tibeta Altebenejo kaj dekoj da specoj de bonkvalitaj drapoj, lanaj kaj feltaj litkovriloj, lanfadenoj kaj aliaj altiris al si apartan atenton de fremdlandaj amikoj. Tiuj estas produktaĵoj de la Linĉi-a Lanŝpinteksejo — la unua tia fabriko sur la Tibeta Altebenejo, kiuj unuafoje aperis en la foiro.

Estas afero neordinara por Tibeto, ke ĝi jam povas liveri produktaĵojn al nia foiro de eksportaj varoj. Por bone kompreni tion oni devas koni ĝian antaŭan ekonomian bazon.

### ĈIAJ INDUSTRIAJ VAROJ ESTIS ENPORTITAJ EN LA PASINTECO

Tibeto estas abunda je naturaj riĉfontoj. Tamen antaŭ la liberiĝo, pro agreso de imperiismo kaj la kruela regado de la feŭda servuta sistemo, ĝia ekonomio estis tre mizera kaj ĉiaj industriaĵoj, bezonataj en ĝi, estis enportitaj.

De la jaro 1912, en Lasao fondiĝis malgrandaj armilriparejo kaj moner-farejo. La riparejo tiam havis nur 30 laboristojn kaj ĉiumonate povis fabriki nur 4 fusilojn. Tiuj fabrikoj ne povis ripari siajn maŝinojn per si mem kaj ili devis importi ĉiujn akcesoraĵojn, inkluzive de ŝraŭbo. En la tuta tibeta regiono eĉ la ĉiutage bezonata alumeto devis esti enportita.

Fremdlandaj agresantoj delonge etendis sian manon en Tibeton. Ili rabis ĝiajn industriajn materialojn kaj vendis al ĝi siajn superflujajn varojn. Ĉiujare fremdlandaj kapitalistoj aĉetis grandan kvanton da lano, feloj, butero, mosko, borakso,


oro kaj aliaj materialoj kontraŭ malalta prezo kaj, post kiam tiuj materialoj estis prilaboritaj, ili reportis la produktaĵojn al Tibeto por vendo je alta prezo. Laŭ registro de historiaj materialoj, ili ĉiujare forrabis milojn da tunoj da lano kaj profiton de miliono da usonaj dolaroj.

### HELPO DE LA ŜTATO

Antaŭ la liberiĝo, neniu ŝoseo sin trovis sur la vasta tibeta areo de pli ol 1,210,000 kvadrataj kilometroj. La transportado de la regiono estis farita ĉefe de gruntoj, azenoj, homa dorseto kaj malmultaj boatoj el bovfeloj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, por krei favorajn kondiĉojn por disvolvi la politikon, ekonomion kaj kulturon en Tibeto, kiam ĈPLA aliris al Tibeto, Prezidanto Maŭ Zedong jam instrukiis, ke la trupoj irantaj al Tibeto “**antaŭen marŝu kaj samtempe konstruu ŝoseon**”. Tiam nia lando estis ankoraŭ en la periodo de restarigo de la nacia ekonomio, multaj rekonstruaj laboroj devis esti farataj. Sed la ŝtato asignis grandan sumon da mono por konstrui la Siĉuan-Tibetan kaj Kinghaj-Tibetan Ŝoseojn kun totala longeco de pli ol 4,300 kilometroj, kaj poste la Hingiang-Tibetan kaj Ĉinan-Nepalan Ŝoseojn. Tiuj kvar ŝoseoj kunligiĝis kun la tibeta ŝosero kun Lasao kiel la centro, ili strikte kontaktigis Tibeton en tre subevoluinta trafikado kun la internaj regionoj de la patrolando. Tra la ŝoseoj la ŝtato transportis diversajn konstruajn materialojn al Tibeto kaj multe akcelis la disvolviĝon de ĝiaj industrioj kaj diversaj aliaj aferoj.

La ŝtato donis multflankajn helpojn al la tibeta industria konstruado. Krom starigo de



*Angulo de Nagin-hidroelektrajo*

kompare grandaj maŝinaj fabrikoj kaj elektraj fabrikoj kaj fondo de karbominaj kaj arbaraj prospektoraj taĉmentoj, la ŝtato aparte fabrikis maŝinojn kaj ekipaĵojn taŭgajn al Tibeto kaj liveris ilin al ĝiaj fabrikoj. En la unuaj 9 monatoj de la lasta jaro, la ŝtato liveris al ĝiaj fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj pli ol 100 diversajn ilmaŝinojn kaj aliajn ekipaĵojn. Nun, fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj estas starigitaj jam en Lasao, Ŝkaze, Nagĉu, Ŝannan, Ĉamdo kaj aliaj lokoj.

#### **SINAPOGO SUR LA PROPRAJ FORTOJ**

Ekde la jaro 1951, post kiam Tibeto estis paco liberigita, fondiĝis tie fabrikoj por produkti agrikulturilojn kaj ĉiutagajn bezonaĵojn. Sed, malhelpate de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, la disvolviĝo de moderna industrio estis ankoraŭ tre malrapida. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, tute bankrotis la absurdaĵo distrumpetita de Liu Ŝaŭki kia "rampismo",

la liberigitaj servutuloj plie elvolvis sian aktivecon por konstrui la socialisman novan Tibeton, pro tio la loka industrio de Tibeto ricevis rapidan disvolviĝon.

Nun, Tibeto jam starigis pli ol 200 fabrikojn kaj minejojn, inkluzive de elektro, karbo, arbaro, kemio, maŝinfarado, metalurgio, konstrua materialo kaj malpeza industrio, kies produktaĵoj atingis centon da specoj, kiaj sulfura acido, cemento, lanaj teksaĵoj, maŝinaj sukero, agrikulturaj maŝinoj kaj ofte-uzataj medikamentoj.

La tibeta popolo disvolvas sian industrion, sin apogante sur la propraj fortoj kaj per pena lukto en malfaciloj.

En la amasa serĉado de minoj en 1970, oni trovis karbominon en Dongga, Ŝkaze-gubernio. Tiam la gvidantoj de tiu gubernio decidis ĝin ekspluati samtempe kun la konstruado per la propraj



fortoj. 5 tibetaj kadroj kaj 31 laboristoj starigis tendojn sur monto pli ol 4,000 metrojn alta super la mara nivelo. Nur en duonmonato ili jam elfosis karbon subĉiele per marteloj, pioĉoj kaj aliaj simplaj iloj. Poste, la karbominejo iom post iom pliiĝis sian personaron kaj plibonigis siajn ekipaĵojn, disvolviĝis de subĉiela fosado al galeria fosado. Nun ĝi havas du oblikvajjn ŝaktojn kun maŝina aerumo, elektra lumigo, elektraj driloj kaj aliaj. Krome, oni konstruis karbominejojn unu post alia ankaŭ en Lasao, Ĉamdo, Nagĉu kaj aliaj lokoj.

En Tibeto sin trovas multaj riveroj kaj lagoj, kiuj abundas je hidraŭlika energio. Post la liberiĝo, tie konstruiĝis nombro da mezgrandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj helpate de la ŝtato. Tiaj elektrejoj konstruiĝis ankaŭ en la Granda Proletara Kultura Revolucio. Teknikaj fortoj



*Tibeta veldistino*

*Angulo de la Linĉi-a Lanŝpinteksejo*




por entrepreni tion rapide formiĝis en Lasao, Ŝkaze, Ŝannan, Ĉamdo, Nagĉu kaj aliaj. Ili profundigis en la vastajn kamparon kaj paŝtejojn por enketo kaj faris prospektadon, projektadon, konstruadon kaj muntadon kune kun liberigitaj kamparanoj kaj paŝtistoj, kio multe akcelis la konstruadon de hidroelektrejoj. La statistiko de Lasao, Ŝkaze, Ŝannan kaj aliaj du lokoj montris, ke oni jam konstruis en ili 59 malgrandajn hidroelektrejojn ĝis la fino de 1971. Ankaŭ alia nombro da tiaj elektrejoj estas en konstruado. Tiuj hidroelektrejoj ne nur ebligis lumigadon per elektro kaj aŭskultadon de brodkasto al la liberigitaj kamparanoj kaj paŝtistoj, kiuj antaŭe uzis oleon kaj pinlignon por lumigo, sed ankaŭ povas provizi per movforto la agrikulturan kaj brutbredan produktadon kaj lokajn industriojn.

## LA UNUA GENERACIO DE TIBETAJ LABORISTOJ

Kun la disvolviĝo de la tibeta industrio, ankaŭ ĝia laborista trupo grandiĝis iom post iom. Nun, la totala nombro de laboristoj en la aŭtonoma regiono pliiĝis de 40,000 antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio ĝis pli ol 60,000, inter kiuj la plejparto estas tibetanoj.

La ŝtato kaj la aŭtonoma regiono donas grandan atenton pri kulturado de la unua generacio de tibetaj laboristoj. Por ke ili rapide posedu teknikon de industria produktado, la ŝtato sendis multajn laboristojn kaj teknikistojn de internaj regionoj al Tibeto por instrui al ili teknikon, kaj ankaŭ la aŭtonoma regiono sendis aron post aro

*Metaltranĉa laborejo de la Lasaa Maŝinriparejo*





da tibetaj kaj alinaciecaj eminentaj laboristoj al universitatoj, fabrikoj kaj minejoj de internaj regionoj por lernado. En konstruado de la socialisma nova Tibeto, la han-aj kaj tibetaj laboristoj interhelpas unu la alian kaj vivas intime kiel fratoj.

Ĵenkin, filo de liberigita servutulo, diplomite en la Tibeta Nacia Instituto en 1964, venis al la Lasa-a Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj kaj fariĝis metilernanto de Han-a laboristo Je Joŭli. Ĵenkin ne sciis multajn industriajn terminojn en la han-a lingvo. Tibeto antaŭe havis nenian industrion, tial en ĝia lingvo mankis tiaj terminoj. Tio kaŭzis al la instruado multajn malfacilaĵojn. Pro tio ili ambaŭ tre malamis la feŭdan servutan sistemon kaj pli amas la novan socion. Dank'

al pacienca instruado kaj modesta lernado, per gestoj kaj bildoj, Ĵenkin rapide progresis. Li nun fariĝis lerta riparisto de agrikulturaj maŝinoj kaj grupestro kaj povas instrui metilernanton kune kun la majstro. Kiam majstro Je donis lecionon al novaj laboristoj, Ĵenkin interpretis por li. Tiel ili sukcese instruis teknikan scion al la novaj metilernantoj.

Nun, la laboristoj kaj teknikistoj devenintaj de liberigitaj terkulturistoj kaj paŝtistoj okupas 70-80% de tiuj en diverslokaj entreprenoj de Tibeto, inter kiuj multaj prenis al si gvidajn laborojn.

Ĉiam elvolvante siajn saĝon kaj talenton la unua generacio de tibetaj laboristoj diligente laboras por pluropaŝa disvolvo de la tibeta industrio.

# Pionira Trupo sur Altebenejo

**L**A 6-a kompanio de iu pionira trupo de la tibeta milita regiono de ĈPLA estas heroo roto kun glora revolucia tradicio. Laŭ la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**Ne timu malfacilojn kaj klopodu konstrui ŝoseon por la frataj naciecoj**”, la 6-a kompanio kaj frataj trupoj, kune kun la tibeta popolo en unuiĝo, konstruis en la periodo de 1950 ĝis 1954 la fame konatan Siĉuan-Tibetan Ŝoseon sur la firsto de la mondo, venkinte torentojn, glaciriverojn, moviĝantan sablon kaj marĉon, irinte tra arbaroj kaj stepoj kaj trans Hengduan-montaroj, tiel ke Tibeto estas strikte ligita kun la interna loko de la patrolando.

De tiam ĝis nun, la kompanio konservas kaj disvolvas la revolucionan tradicion de niaj partio kaj armeo, rigardante penlaboron kiel gloron kaj prenante la landliman regionon kiel sian hejmlokon. Ili trairis multajn neĝkovritajn montojn sur la altebenejo kaj faris kontribuojn por konstrui la novan socialisman Tibeton.

En iu vintro, la kompanio venis al loko de Himalajo por konstrui ŝoseon. La loko estas alta je pli ol 5,700 metroj super la mara nivelo, kaj tre maldensa estas tie la aero. Post multa klopodo ili starigis siajn tendojn en tia vetero. Matene de la sekvanta tago, ili jam komencis konstruadon en akra frosto.

Fronte al malfaciloj kaj peniga laboro, la batalantoj diris brave: “Ju pli alta estas la monto, des pli granda nia volo. Kvankam la vetero estas frosta, tamen nia koro estas varma. Ni deziras degeligi la glacieron per nia varma sango.” Ili decidis kontribui siajn fortojn por konstrui la landliman regionon, laŭ la armekonstrua linio de Prezidanto Maŭ.

Kiam glate iris la konstruado, ili renkontis glaciriveran zonon, kiu somere fariĝis elasta vojo pro degelo de glacio kaj amasiĝo de sablo, ŝtonoj kaj ŝlimo, kaj vintre malmola glacia tabulo dika je du metroj. Ili decidis bori la glacieron por eksplodigi la glaciigitan teron. Kvankam iliaj vangoj suferis de haŭterdefalo kaj lipoj de fendetoj en ĝisoste frosta vento, tamen ili ĉiuj laboris gaje. Post penlaborado, ili venkis la “glacian tabulon” kaj la nova ŝoseo etendiĝis antaŭen.

En 1970, la 6-a kompanio ricevis taskon helpi Tibeton en iu grava konstruo. Pro manko de oksigeno, la laboro en tunelo estis tre malfacila. Por garantii glatan iradon de la konstruo, ĝia partia filio asignis al la 6-a subplotono malfacilan taskon starigi subtenilojn en la tunelo. Komunisto kaj vic-subplotonestro Vang Kĵuan ĉiam laboris en la plej danĝera loko kaj observis probable aperontan danĝeron por forigi danĝerajn ŝtonojn por batalantoj en portado de traboj kaj starigo de subteniloj. Soldato Ĝang Ginting prenis laboron sur la plej danĝera subtenilo. Ilia sukcesa plenumo de la tasko sekurigis la konstruantojn en la tunelo.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, la komandantoj kaj batalantoj de la 6-a kompanio estis anstataŭigitaj unuj post aliaj, tamen la revolucia tradicio de penema luktado en malfaciloj ĉiam estas konservata.

Vang Kingfang, politika direktanto de la bataliono super la 6-a kompanio, antaŭe estis politika direktanto de la kompanio. Post la promocio, li ofte revenis al la kompanio por rakonti al la batalantoj ĝian gloran historion de penema luktado en malfaciloj. Sur la konstruejo li laboris kiel ordinara soldato, timante nek penigon nek malpuraĵon. Batalantoj diris: “Niaj kadroj ĉiam antaŭiras en ĉia ajn laboro, prenante al si plej penigajn kaj malpurajn laborojn. Ilia aĝo estas pli granda ol la nia, ilia labortempo en Tibeto pli longa, ilia kontribuo pli multa kaj ilia politika konscio pri daŭra revolucio pli alta. En nia lernado de la kadroj, ni devas memkonscie hardi nin en peniga medio.”

Soldato Li Dinggie estas diplomito de supera mezlernejo. Varbita li fariĝis pionira soldato sur altebenejo kaj pri tio li ne kontentis. Sed, sub la bona influo de la glora revolucia tradicio de la kompanio, li memkonscie sin hardis en peniga medio kaj fariĝis, en arda batalado, membro de la Komunista Partio de Ĉinio. En iu konstruado de unu ponto li iris sur provizora ponto ŝultroportante pezan pontan trabon, falis en la riveron pro malatento kaj kontuziĝis lia vango. Elriveriĝinte kaj vindinte la vundon, li denove daŭrigis la portadon. Li diris: “Por konstrui la landliman regionon pli prospera, mi volontas batali sur la neĝoblova altebenejo dum mia tuta vivo.”

# Bonodoras Fruktoj en Tibeto

**D**UM la aŭtuna rikolta sezono, zefiro jen kaj jen alblovigis al ni aromon de pomoj, sukaj persikoj kaj piroj en rivervalo ĉe la piedo de tibeta neĝkovrita monto.

Malfacile estas produkti pomojn kaj aliajn fruktojn sur la Tibeta Altebenejo. Antaŭ la liberigo, nur en iuj malaltejoj kaj kortoj de la tiranaj regantoj vidiĝis malmultaj pomarboj kun malgrandaj fruktoj, kiujn oni rigardis kiel "trezorojn". Sed nun la tibeta laboranta popolo jam havas fruktojn por manĝi. Kia ŝanĝiĝo!

En septembro, ni vizitis kelkajn fruktoĝardenojn de Tibeto kaj propraokule vidis kiel la soldatoj kaj tibetaj ĝardenaj laboristoj kaj oficistoj faras fruktoĝardenon sur virga monto kaj tie kulturas diversajn fruktarbojn. Ĉu en la kultivejo "La Unua de Aŭgusto" aŭ sur la bordoj de Jalucangporivero, ĉu ĉe la piedo de Tieŝan-montaro aŭ apud Jigong-lago, ĉie en fruktoĝardenoj ni povas vidi arbojn kun abundaj pomoj, sukaj persikoj, piroj kaj aliaj fruktoj. Tibetaj laboristoj, oficistoj kaj liberigitaj servutuloj estis ĝoje kolektantaj fruktojn por transporti ilin aliloken. La tiea produkto-kvanto de fruktoj en 1972 pliiĝis je ĉirkaŭ 20% kompare kun tiu en 1971.

Ĉie, kien ni alvenis, mastroj de fruktoĝardenoj varme regalis nin per bongustaj pomoj kaj piroj. Kamarado Nie Hanŝan, gvidanto de fruktoĝardeno apud Jigong-lago, diris al ni kun bananpomo 400 gramojn peza en la mano: "Jen frukto de batalo kontraŭ la naturo!" Dum la vizitado, kamaradoj de la ĝardeno multe rakontis al ni, kiel ili ekspluatit virgajn montojn kaj kulturas fruktarbojn.

Kiam oni konstruas fruktoĝardenon sur la neĝkovrita altebenejo, oni devas atenti pri atako de glacivero kaj tero-ŝtona fluo. Pro tio la soldatoj kaj laborantoj ofte profundigis en amasojn por esplori kaj lerni de ili sperton de batalo kontraŭ tero-ŝtona fluo kaj glacivero. Dongbogiaŭ-fruktoĝardeno sur montodeklivo estas konstruita sisteme de la ekspluatantoj laŭ sperto de la tieaj



*Riĉa rikolto de pomoj*

amasoj. Tiam ili pene forportis ŝtonegojn kaj forhakis dornarbojn. En 1968, abrupte torentis glacivero. La vasta relative ebena tereno estis kovrita de sablo kaj ŝtonoj, sed la ĝardeno ne suferis perdon. Nun ili kulturas diversajn fruktarbojn sur la antaŭe dezerta montodeklivo post penema luktado de 12 jaroj, kaj rikoltis 135 tunojn da fruktoj en 1972.

La fruktoĝardeno de la kultivejo "La Unua de Aŭgusto" situas sur altebenejo je pli ol 3,700 metroj super la marnivelo. La tiea forta ultraviolo serioze malhelpas la kreskon de fruktarboj. Ili tion evitis per efikaj rimedoj post ripetada scienca eksperimentado. Nun, fruktarboj ne nur povas bone kreski en la relative malalta orienta parto de Tibeto, sed iuj el ili ankaŭ povas bone kreski kaj frukti en ĝia okcidenta parto alta je pli ol 4,000 metroj super la marnivelo.

Estas ĝojinde, ke tibetaj laborantoj estas elkulturitaj. La tibeta orfino Janggin, kiu almozpetis en la malnova socio, nun jam ellernis plantajn teknikojn kaj fariĝis laboristino de la ĝardeno. Ŝi kaj aliaj laboristoj varme amas sian laboron kaj klopodas fari kontribuon por disvolvi fruktokulturadon sur la altebenejo.

Je la adiaŭo post nia vizito, mastroj de la ĝardeno diris al ni kun plena memfido: "Ekspluati kaj konstrui landliman regionon estas longdaŭra kaj peniga batalo. Tamen la praktiko pruvis, ke la diligentaj kaj saĝaj laborantoj povas venki venton kaj neĝon de la altebenejo kaj produkti pli kaj pli multajn fruktojn de diversaj specoj, por kontentigi la bezonon de laboranta popolo paŝon post paŝo."

# *Nova Fizionomio*

## *Ambaŭborde de*

**L**A meza parto de Jangzi-rivero (de Ĝiceng de Hubej-provinco ĝis Ĉenglinggi de Hunan-provinco) estas nomita Ginggiang-rivero. Ĝia baseno estas malalta fekunda ebenejo. Ascendinte la antikvan pagodon de la grava urbo Ŝaŝi sur la meza parto de Jangzi-rivero, oni povas klare vidi la inundakvo-disigajn konstruaĵojn de Ginggiang-rivero starigitajn post la Liberiĝo: Sur la norda bordo zigzagas larĝa kaj alta digo de

Ginggiang-rivero longa je 182 km. kaj sur la suda bordo staras inundakvo-enlasa kluzo. Sur la rivero navigas plenŝarĝitaj ŝipoj, ĉe la rivera haveno Ŝaŝi streĉe iras ŝarĝ-kaj-malŝarĝa laboro por interŝanĝi industriajn kaj agrikulturajn produktaĵojn de la regiono. Antaŭ la Liberiĝo, Ginggiang-rivero havis mallarĝan kaj kurban fluejon kaj densajn malprofundaĵojn kaj insuletojn en si, tiel ke ĝi ofte inundis la fekundan kamparon sur


*Kluzo por enkonduko de inundakvo*



# Ginggiang-rivero

ĝiaj bordoj pro malglata fluado de superakvo dum ĉiu pluva sezono. Laŭ koncernaj historiaj materialoj, ĝi breĉiĝis 20 fojojn de 1912 ĝis 1949 kaj portis al la popolo grandajn katastrofojn.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ sankciis la projekton de la inundakvo-disigaj konstruaĵoj de Ginggiang-rivero en 1952 por elimini la suferon de tieaj polanoj, kaj je la 19-a de la samjara majo donis



*Laboras k-do Liaŭ Guohong, vicsekretario de la partia komitato de Fuhin-komunumo, Gong-an-gubernio, kiu estis labora modelo siatempе dum la konstruado de la inundakvo-disiga konstruaĵo de Ginggiang-rivero.*

al la konstruantoj silkan standardon kun lia persona subskribo “Klopodu por sukcese kompletigi la inundakvo-disigajn konstruaĵojn de Ginggiang-rivero por la bono de la vasta popolo!” kaj tio forte stimulis la popolon de tiu regiono.

Sub la forta subteno de la ŝtato, la popolo de Ginggiang-regiono konstruis kaj firmigis kontraŭinundan digon sur la norda bordo kaj samtempe ankaŭ inundakvo-disigan zonon sur la malalta loko en Gong-an-gubernio de Hubej-provinco sur la suda bordo kun areo de pli ol 900 kvadrataj kilometroj, kiu povas enteni 5.4 miliardojn da kubmetroj da inundakvo, kaj konstruis kluzon kapablan enlasi 8,000 kubmetrojn da akvo po sekundo. Krome, oni konstruis kluzon sur Hudu-rivero ĉe la malsupra parto de la inundakvo-disiga zono por kontroli la akumulitan akvon. La konstruado de la nomitaj projektaĵoj komenciĝis je la 5-a de aprilo 1952 kaj komplete finiĝis post 75 tagoj. De tiam la polanoj ambaŭborde de Ginggiang-rivero ne plu suferas inundan katastrofon.

En 1954, la inundakvo-disigaj konstruaĵoj de Ginggiang-rivero eltenis provon maloftan en la historio. Tujare, aperis la plej alta akvonivelo en la historio, kaj 13 miliardoj da kubme-



troj da superakvo ne povis sekure traflui la riveron. Dank' al trifoja malfermado de la inundakvo-disiga kluzo, la vasta kamparo kaj la granda industria bazo Vuhan estis sekurigita. Sed la superakvo de 1935, je 4 miliardoj da kubmetroj malpli multa ol la kvanto en 1954, inundis pli ol 250,000 hektarojn da kampoj ambaŭborde de la rivero, dro-nigis pli ol 14,000 homojn kaj senhejmigis 1,650,000 loĝantojn.

En la pasintaj pli ol dek jaroj, la lokaj popola-noj plene utiligis la teron en la inundakvo-disiga zono. Ili elmetis revolucionan sloganon: "Dum disigo de inundakvo, la zono servu al protekto de la sekureco de la tuta regiono, kaj en la normala tempo ni devas garantii riĉan rikolton en ĝi!"


Sub la gvido de la diversnivelaj partiaj organi-zoj, la lokaj popolanoj plialtigis je unu metro la digojn de pli ol 200 kilometroj en la inundakvo-disiga zono. En tiu malalta zono ili konstruis 21 sekurajn areojn kaj 75 sekurajn punktojn, en kiuj ili konstruis pli ol 890 brikajn domojn kun plank-spaco de pli ol 356,000 kvadrataj metroj kaj ŝosean reton. Dank' al tio ili povas en 24 horoj, antaŭ disigo de inundakvo, transporti la posedaĵojn de individuoj kaj kolektivoj al sekuraj lokoj.

Samtempe kun tio ili energie faris agrikulturan bazan konstruadon por akiri riĉan rikolton. Ĝis nun oni jam fosis pli ol 520 kanalojn ĉefajn kaj branĉajn kun longeco de 1,200 km., kiuj formis


irigacian reton. Dank' al scienca kulturado la produkto de greno kaj kotono leviĝis jaron post jaro.

En la pasintaj pli ol dek jaroj, la popolanoj sur la norda bordo de Ginggiang-rivero plene utili-gis la kolektivajn fortojn por reformi la naturon. Mianjang-gubernio situanta inter la riveroj Ging-giang kaj Hanŝuj (branĉo de Jangzi-rivero) havas pli ol 90 grandajn kaj malgrandajn lagojn. En la malnova socio la feŭdaj bienuloj ĉiu por si mem konstruigis digojn ĉirkaŭ la lagoj, kio kaŭzis malor-don de la akvosistemo. Post kompleta enketo kaj projektado post la Liberiĝo, la agrikulturaj pro-duktaĵoj kooperativoj (kiuj poste formis popolajn komunumojn) de la tuta gubernio faris unuigitan ordigon al la riveroj kaj lagoj sub gvido de la gu-bernialaj partia komitato kaj registaro. En la pasin-taj pli ol dek jaroj, movinte 244,120,000 kubmetrojn da tero ili konstruis pli ol 6,600 kulvertojn kaj klu-zojn grandajn kaj malgrandajn kaj fosis pli ol 17,000 ĉefajn kaj branĉajn kanalojn, per kiuj oni fundamente efektivigis laŭbezonaĵajn irigacion kaj drenadon. En 1971 la popolo de Mianjang-gubernio konstruis elektran pumpstacion kun kapablo de 180 kubmetroj po sekundo kaj plie altigis la rezistan kapablon kontraŭ naturaj katastrofoj. En 1972, la produktokvanto de greno atingis 426,000 tunojn, je 2.6-oblo super tiu de 1949; tiu de kotono atingis 22,000 tunojn, je 13.8-oblo super tiu de 1949.

### *Angulo de kotonaĉetejo*







*Granda akvedukto konstruita de la popolanoj de  
Gingĝoŭ-regiono por irigacii 300,000 muojn da agro*

La popolanoj de Gingĝiang-rivero akiris sukceson ankaŭ en disvolvo de forstokulturo kaj surakva trafiko.

Kiangiang-gubernio sin trovas en malalta regiono. En la pasinteco, arboj malfacile kreskis pro tro alta subtera akvonivelo kaj ofta inundiĝo. En la komenca periodo post la Liberiĝo la nombro de arboj estis nur 4-oblo de tiu de la guberniaj loĝantoj. Hodiaŭ, en Kiangiang-gubernio ĉie prosperas arbaraj zonoj. Strikte ligante la forstokulturadon kun akvoutiliga konstruado, oni plantis arbojn ambaŭborde de pli ol 30,000 nove fositaj kanaloj grandaj kaj malgrandaj en la pasintaj pli ol dek jaroj. La kulturitaj arboj nombriĝas pli ol 68,000,000, t.e. pli ol 120-oblo de la nombro de la loĝantoj.

En la pasinteco, la trafiko ambaŭborde de Gingĝiang-rivero estis tre malfacila. Kvankam tie

sin trovis kelkaj kompare grandaj riveroj, tamen nur malgrandaj lignaj boatoj povas navigi en ili pro malprofundiĝo de la riveroj. Sub gvido de la diversnivela partiaj organizoj la popolanoj de Gingĝoŭ-regiono samtempe entreprenis konstruadon de akvoutiligo, navigacio kaj ŝoseo laŭ unueca plano, tiel ke ŝipoj povas navigi en kanaloj kaj aŭtoj povas veturi sur digoj. Krome, ili ankoraŭ konstruis ŝoseojn kun longeco de pli ol 2,000 km. kaj vojojn kun longeco de pli ol 500 km. travetureblajn per aŭtoj kaj traktoroj. Nun, en la 13 gubernioj kaj urboj de Gingĝoŭ-regiono jam formiĝis ŝosea reto, kiu ligas multajn popolkomunumojn. Ankaŭ la rivera navigacio ricevis rapidan disvolviĝon. La longeco de navigeblaj riveroj pliiĝis de 2,050 km. post la Liberiĝo ĝis pli ol 4,700 km.


Kun la disvolviĝo de akvoutiliga konstruo, ankaŭ la fiŝbredado ricevis disvolviĝon. En la lasta jaro la tuta regiono metis pli ol 2 miliardojn da fiŝidoj en akvokonservejojn kaj lagojn.

# Hehengĉeng-brigado Mem Fabrikas Agrikulturilojn

**H**EHENGĈENG-brigado de Ŝangĉeng-komunumo en Ĉeng-an-gubernio de suda Hebej-provinco estas vilaĝo kun 1,200 personoj de pli ol 200 familioj kaj 163 hektaroj da agro. Dum la lastaj jaroj la kadroj kaj komunumanoj de la brigado propramane reformis kaj fabrikis pli ol 1,100 agrikulturilojn de 36 specoj, kiuj taŭgas por iliaj agrikulturaj laboroj.

Tio komenciĝis en la jaro 1965. Tiujare la produktokvanto de greno kaj kotono de la brigado multe kreskis dank' al tio, ke la komunumanoj al-

prenis la novan metodon kun miksemado kiel la ĉefa punkto anstataŭ la tradicia. Antaŭe en unu jaro la kampoj donis nur 1-2 rikoltojn, sed nun 3-4 rikoltojn, tial multe konsumis homfortojn sarkado, irigaciado, eliminado de fiinsektoj, sterkopreparado transportado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Ni prenu la jaron 1964 kiel ekzemplon. Tiam la tutjara kamplaboro bezonis nur 120,000 labortagojn, tamen nun 300,000 labortagojn post la disvastigo de la nova metodo sur vastaj areoj. Sed la komunumanoj de la brigado, inkluzive de la duontagaj laboruloj, plenu-



*Reformado de semilo*



mas nur 140,000 labortagojn kondiĉe ke ĉiuj laboras sen unutaga foresto. Kaj krome post la alpreno de la nova metodo la agrikulturaj instrumentoj plejparte estis ne taŭgaj por semado, sarkado kaj sterkado pro tio, ke sur sama parcelo samtempe kunestis malsamaj plantaĵoj — iuj semitaj en printempo kaj aliaj en somero, iuj en sulkoj kaj aliaj sur eĝoj, iuj kreskantaj alte kaj aliaj ĵus elterigitaj, iuj bezonantaj multe da akvo kaj sterko kaj aliaj male.

Antaŭ la jaro 1965, Hehengĉeng-brigado semis tritikon per dupieda lignosemilo kun larĝeco de 40 centimetroj, sed nun ĝi devas esti reformata en tri-piedan fersemilon kun larĝeco de 33 centimetroj por ke ĝi estu taŭga por miksa semado de kotono kaj tritiko. Por tio Ĝaŭ Kihiang, vicsekretario de la partia filio de la brigado, vizitis kelkajn lokojn, kun la lignosemilo sur ŝultro, tamen li malsukcesis en la reformado. Je tia okazo iuj konservemaj komunumanoj diris: “La lignosemilo 40 centimetrojn larĝa estas uzata de generacio al generacio, oni vane klopodas por ĝin reformi.”

Ĉu vere tiel? Ĝaŭ Kihiang kaj kelkaj komunumanoj asertis: “Ni certe sukcesos en reformado de la lignosemilo, nur se ni rompos la malnovan

rutinon kaj funkciigos nian cerbon.” Subtenate de la partia filio ili decidis reformi ĝin per si mem. Post ripetada provado ili sukcese elfaris la tri-piedan fersemilon.

Tiu afero multe kuraĝigis ilin. Por rapidigi la agrikulturan mekanikigon kaj gajni pli bonan agrikulturan rikolton, la brigado starigis fabriketon. Ili reformis la malnovan ilmaŝinon aĉetitan el la gubernia urbo en drilon kaj, faris elektran lutilon el la aĉetita nombro da siliciaj ŝtalpecoj kaj elektro-fadenoj. Dank’ al tio ili solvis la problemon de forĝado, kunligado, lutado kaj drilado nur per 73 juanoj. Por venki malfacilaĵojn en tekniko la brigado starigis grupon por reformi kaj fabriki agrikulturilojn kun partopreno de kadroj, veteranaj kamparanoj kaj brigadaj teknikistoj. Tiu ĉi grupo riparas kaj fabrikas kion la produktado bezonas.

La traktoro kaj malnovaj plugiloj ne taŭgas por plugado sur la kampoj kun mikse kreskantaj plantaĵoj. Post ripetfoja provfarado ili sukcese fabrikis turnoplugilon, kiu estas bone uzebla kaj ne vundas plantaĵojn dum plugado. Por kontentigi malsamajn bezonatajn kvantojn de akvo kaj sunlumo de malsamaj plantaĵoj mikse kreskantaj sur sama parcelo, oni devas prepari bedojn. Tiu laboro



*Miksa kulturaao de tritikaj kaj kotonaj plantoj*

bezonas multe da laborfortoj. Antaŭe unu homo povis maksimume bedigi  $\frac{1}{15}$  hektaron en ĉiu tago, sed nun du homoj povas prepari potage pli ol 1.3 hektarojn da bedoj, uzante skrapmaŝinon tiratan de unu ĉevalo. Cetere tiu maŝino estas facile manipulebla, bonkvalite skrapas teron kaj ne vundas plantaĵojn.

Post kiam la plejparto de kampaj laboroj estas plenumita de agrikulturiloj, ili komencis reformi kaj fabriki maŝinojn por prilabori agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn.

Ĉiujare oni dispecigis rekrementojn de oleo per granda kvanto da homaj kaj brutaj fortoj por sterki la kampon. Tial la fabriketo de la brigado decidis fari dispecigilon, tamen al ĝi mankis forno kaj modelo. Malgraŭ la malfacilaĵoj komunista Vang Ŝoŭtian kune kun aliaj eltrovis bonajn ideojn uzi fosajon kiel fornon kaj ŝtonrulilon kiel modelon kaj fine sukcesis fari dispecigilon. Antaŭe tagnokte oni dispecigis per brutoj 1,500

kilogramojn da rekremento, sed nun per la maŝino 1,700 kilogramojn pohore. Tio ege ĝojigis la komunumanojn.

Post peniga batalo dum kelkaj jaroj ili mem fabrikis nombron da mezgrandaj kaj malgrandaj agrikulturiloj, kaj dume aĉetis de la ŝtato iujn grandajn agrikulturajn maŝinojn. Nun Hehengĉeng-brigado posedas 4 traktorojn, 2 kamionojn, 16 pneŭmatikajn ĉarojn, 4 ĉevaltirajn turnoplugilojn, 2 ĉevaltirajn skrapmaŝinojn, 12 maŝinojn por sarkado, sterkado kaj malkompaktigo de grundo kaj pli ol 20 ĉevaltirajn kaj aliajn semilojn. Krome oni uzas ankaŭ maŝinojn en draŝado, muelado kaj senŝeligo. Dank<sup>o</sup> al ĉio ĉi tio granda kvanto da laborfortoj estas liberigita el la pezaj laboroj.

Kun senĉesa disvolviĝo de la agrikultura mekanikigo, la produktokvanto de greno de Hehengĉeng-brigado kreskis jaron post jaro. En la jaro 1964, la meznombraj pomuaj\* produktokvantoj de sensemigita kotono kaj greno estis respektive 36 kaj 105 kilogramoj, tamen en la jaro 1971 82 kaj 695.5 kilogramoj. Dum la periodo de 1966 ĝis

1971 tiu ĉi brigado liveris al la ŝtato 505,000 kilogramojn da superflua greno, 600,000 kilogramojn da sensemigita kotono kaj 175,000 kilogramojn da mangoleo. Kaj la kolektiva akumulita fonduso kaj la rezervata greno de la brigado ankaŭ multiĝas tagon post tago.


\*1 mu-o =  $\frac{1}{15}$  hektaro.




# Tibeto Antaŭenmarŝas

La diversnaciecaj popolanoj de Tibeto en strikta unuiĝo kune konstruas la novan Tibeton. La foto montras ke la tibeta teknikistino Cajdangŭoga kaj han-a laboristo de la Lasa-a Mekanika Riparejo kune studas pri produkta tekniko.








Rikoltado sur la altebenajo

Filino de liberigita servutulo fariĝis traktoristino.












Kadroj de la kvartala komitato gastas en la hejmo de la liberigita servutulo Gongjuecifen.

La unua generacio  
de karboministoj




Angulo de la kontrolejo pri produktaĵoj de Linĉi-a Lanŝpinteksejo



Nova hidroelektrejo en konstruado





Stepa pejzaĝo de la norda Tibeto



Nova generacio en sana kreskado


Armeanoj kaj milicianoj kune gardas la landlimon.





Ĉe piedo de Himalajo





# Generalo

# Kamparano

*Kamarado Gan Zuĉang*

**L**A ĉinoj bone scias la rakonton, ke generalo fariĝis kamparano.

Jam forpasis 15 jaroj de post kiam Gan Zuĉang malmobiliziĝis kaj ekportis kamparanan veston.

Dum la longtempa revolucia milito, veterana ruĝarmeano Gan Zuĉang estis trifoje grave vundita je la kapo. En la jaro 1957, li suferis seriozan cerebroskan, tial li ne povis daŭrigi sian laboron en la armeo. Laŭ lia postulo kaj kun konsento de la supera instanco, li revenis al sia hejmloko Janbej-vilaĝo, Lianhua-gubernio ĉe la piedo de Ginggang-montaro, kie li ripozis por resaniĝo kaj partoprenis en fizika laboro.

## PENEMO KAJ ŜPAREMO

En la militaj jaroj, Gan Zuĉang jam kutimiĝis al ŝparemo kaj penemo. Foje, kiam li okupiĝis pri la postfronta servo en la Ruĝa Armeo, li donis pecon da ŝtofo al arma kudrejo por fari ĉapojn. Post mezurado tajloro diris ke el la peco oni povos fari nur 55 ĉapojn. Sed, helpate de Gan Zuĉang, li zorgeme kalkulis kaj fine faris 59 ĉapojn.

Post reveno al sia hejmloko, li ankoraŭ tenis al si tiun stilon. Dum la lastaj kelkaj jaroj, Jan-

bej-brigado faris multajn akvoutiligajn konstruaĵojn. Proksime de la vilaĝo sin trovis akvorezerva lago, kies digo estis konstruita antaŭe per pinoj kaj adoboj. Dum ĉiu inundo, ili estis forportitaj de akvego. Gan Zuĉang pensis, ke tio ne nur malŝparas homajn fortojn kaj materialojn sed ankaŭ ne povas garantiigi ĝustatempan irigaciadon al 14 hektaroj da agro. Li proponis al la brigado ke oni nepre ĉiel ĝin rekonstruu fortika.

En aŭtuno, malmulte pluvis kaj la rivero sekigis. Kaptinte la ŝancon, Gan Zuĉang ripetade esploris la fundon de la rivero. Iun vesperon, preterpasante Janbej-riveron je sia reveno post kamplaboro, komunumanoj trovis ke li ankoraŭ fosas la fundon per pioĉo. Maljuna komunumano Hie Zong-en venis al li kaj demandis: "Kion vi faras, mia frato?"

Tiun vidinte, Gan Zuĉang diris kun ĝojo: "La fundo estas ŝtona. Mi proponas, ke oni rekonstruu la digon ĉi tie, ĉu bone?"

Ĉirkaŭrigardinte, tiu respondis: "La ŝtona fundo ja estas malmola, tamen la situo ŝajnas iom malalta." Gan Zuĉang opiniis, ke la diro estas atentinda. En la sekvanta tago li invitis veteranajn kamparanojn kaj detale demandis pri la alteco de

la rivera nivelo dum la normala kaj inunda tempo. Poste li mezuris la fundon per lignostango kaj trovis ke ĝia situo estas ne malalta kaj taŭga por konstrui la digon. Por certigi la enketon li invitis teknikiston de la gubernia akvoutiliga buroo kaj ankaŭ tiu faris la saman konkludon. Ĉar la konstruo bezonas 35 tunojn da cemento, 2 tunojn da feraj stangetoj kaj multajn laborfortojn, kadroj de la brigado postulis ke Gan Zuĉang raportu tion al la gubernia registaro por akiri helpon. Li respondis kun rideto: “En tiu loko la Ruĝa Armeo siatempe starigis arsenalon, kiu fabrikis pafilojn kaj kuglojn nur el eluzitaj kupraĵoj kaj feraĵoj per simplaj balgobloviĵoj kaj marteloj. Ankaŭ en nuna konstruado, ni devas disvolvi tiun spiriton kaj ne dependigi nin de la ŝtato.” Post tio, laŭ sia detala enketado kaj preciza mezuro, oni ekkonstruis la digon sur la zigzaga malmola ŝtona riverfundo, kio povis ŝpari homajn fortojn kaj materialojn.

La fruaŭtuna suno estis ankoraŭ varmega. Sub la gvido de Gan Zuĉang la komunumanoj ko-

mencis ardan laboron por konstrui la laĝeton, kiu povas irigacii kampojn kaj produkti elektron. Sin apogante sur la propraj fortoj kaj alprenante simplan metodon, ili finis la konstruon post 18 tagoj uzinte 10 tunojn da cemento. Alifoje, la ŝtato asignis 30,000 juanojn por konstrui ŝosean ponton super Janbej-rivero. Tie troviĝas origine malnova ŝtonponto, el kies ses pilieroj kvar estas ankoraŭ fortikaj. Li do kune kun brigadaj kadroj kaj komunumanoj nove konstruis du pilierojn kaj zorgeme larĝigis kaj fortikigis la aliajn kvar malnovajn. Krome ili pavimis la surfacon per gruzo anstataŭ cemento. Fine ili bonkvalite konstruis tiun ĉi ponton, elspezinte nur 11,000 juanojn.

### ORDINARA SOLDATO

Gan Zuĉang ofte diras: “Mi devas bone labori kiel la antaŭa veterana ruĝarmeano, sed ne sidi sur meritoj kaj agi kiel granda sinjoro.” Li ĉiam rigardas sin ordinara soldato kaj ne volas ĝui privilegion en vivo.


*Gan Zuĉang (fronte maldekstre) kaj amasoj sub lia gvido ekspluatas ruĝgrundan virgan teron.*



Dum la amasa movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, Gan Zuĉang kaj komunumanoj kune konstruis malgrandan hidroelektran stacion kun 12 kilovatoj, kiu servas al la muelado de la brigado kaj lumigado de parto el komunumanaj familioj. Brigada kadro diris al li: “Onklo Zuĉang, vi multon kontribuis en konstruado de la stacio, kaj ni unue devas instali elektran lampon en via hejmo!” Sed li ne konsentis, dirante: “Nun nia malriĉa montvilaĝo havas elektron, tion ni ŝuldas al Prezidanto Maŭ. Penlabori unue kaj ĝui poste estas la devo de komunisto. Estos ankoraŭ ne malfrue instali por mi elektrolampon, post kiam ĉiuj aliaj ĝin havos.” Post nelonge, la elektra stacio anstataŭigis la malnovan generatoron per la 24-kilovata, kaj sufiĉas ankaŭ la elektraj fadenoj por instali elektrolampojn. Por ŝpari elektron, la komunumanoj decidis post diskutado, ke ĉiu familio instalu elektrolampon kun 15 vatoj. Konsiderante ke li estas maljuna kaj la vidkapablo malbona, la elektristo intencis por li instali elektrolampon kun pli multaj vatoj. Sed Gan Zuĉang diris: “Mi estas ordinara kamparano, sed ne eksterordinara komunumano. Mi devas observi la disciplinon pli bone ol la aliaj, ĉar mi estas maljuna kaj ricevis longtempan edukadon de la Partio.” Fine, la elektristo devis instali por li la saman elektrolampon.

Foje, kiam Gan Zuĉang kaj alia kamarado vojaĝis al alia loko pro laboro, la akceptejo aranĝis por li kompletan da plej bonaj ĉambroj. Rigardante tiom bonajn ĉambrojn, li memoris la plankajn litojn ĉe Ginggaŝ-montaro, tendojn sur la vojo de la Longa Marŝo kaj kavernodomon en Nannivan. La scenoj de malfacila vivo dum la milita periodo aperis antaŭ liaj okuloj unu post alia, kaj sonis ĉe liaj oreloj la instruo de Prezidanto Maŭ: “... **la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penema luktado**”. Li deadmonis sian kamaradon kaj fine ili venis al malgranda hotelo.

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ofte diras al li: “Vi estas jam maljuna kaj malforta, onklo Zuĉang, kaj vi devas pli bone atenti pri via nutrado.” Tio tre kortuŝis lin. Pensante pri la mizera vivo, kiun li vivis en la malnova socio kaj kiun ankoraŭ vivas nun multaj laborantaj popoloj en la mondo, li decidis peneme batali tutan vivon por efektiviĝi komunismon. Nun li ankoraŭ uzas tiun tornistran donitan en la militaj jaroj, kiun li poste flikis sesfoje. Kiam ĝia rimeno rompiĝis, li ankoraŭ ne volis forĵeti kaj ĝin reuzis post riparo. Foje, reveninte de Pekino dost kunveno,



*Vizito al amaso*

en lia tornistro nenio aldoniĝis krom iuj lernendaj dokumentoj kaj tubeto da nova dentpasto.

Dum 15 jaroj post sia reveno, Gan Zuĉang ĉiam sin tenas modesta kaj penema kaj strikte ligiĝas kun la popolamasoj.

## EDUKO AL LA NOVA GENERACIO

Gan Zuĉang serioze faras edukadon al siaj infanoj kaj aliaj junuloj. Li ofte diras al siaj infanoj: “Penemo estas la glora tradicio de la proletaro, kaj la bela vivo de la socialisma nova kamparo devenas de nia penema laborado.” Li kaj liaj familianoj difinis familian regulon: Lerni de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ĉiutage partopreni en kolektiva produkta laboro.

Kiam lia plejaĝa filino Pingĵong devis lerni aliloke, Gan Zuĉang aĉetis por ŝi pecon da blanka ŝtofo,



poste ĝin mem tinkturis kaj kudrigis du kompletojn da vestoj, por ke ŝi surportu en lernejo. Sed ŝi ne volis ilin surporti. Li do pacience admonis ŝin: “Vi devas scii ke ankaŭ en lernejo vi devas persisti en partopreno de laborado. Tiuj vestoj estas fortikaj, belaj kaj popularaj, kiujn vi povos porti kontraŭ vento kaj prujno.” Pingjong komprenis sian patron kaj gaje iris al lernejo en tiuj novaj vestoj.

En la jaro 1965, Lianhua-gubernio starigis agrikulturan mezlernejon laŭ la principo de Prezidanto Maŭ pri la proletara eduko. Kiel la honora direktoro de la lernejo, Gan Zuĉang decidis bone administri tiun lernejon per la spirito de Nannivan. La instruistoj kaj lernantoj venis en montvalon kun densaj sovaĝaj bambuoj kaj herbaĉoj, kaj tie ili faris adobojn kaj hakis bambuojn por konstrui domojn. Iuj lernantoj ŝanceliĝis antaŭ intensa laboro kaj malfacila vivo. Sub granda pino Gan Zuĉang donis al ili edukon pri la revolucia tradicio. Li unue demandis: “Ĉu vi sentas malfacilojn en la vivo, kamaradoj?” Iu juna lernanto diris: “Ĉu ni povus manĝi malpli da kukurbo?” Lia diro eksplodigis al ĉiuj ridon.

“La kukurbo estas ja trezoro!” diris Gan Zuĉang. “Dum la batalado sur Ginggang-montaro,

kiam Prezidanto Maŭ gvidis nin en revoluciado, ni ĉiam manĝis ruĝrizaĵojn kaj trinkis kukurban supon. Sed ni starigis la revolucion bazon de Ginggang-montaro.” Poste, li rakontis al ili, kiel la 359-a brigado en kiu li servis siatempe peneme luktis per siaj propraj fortoj en Nannivan laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj akiris riĉan rikolton. Tio multe kuraĝigis kaj edukis la lernantojn. Poste ili entuziasme sin ĵetis en la laboron. Gan Zuĉang ĉiam edukis la aliajn per sia modela konduto. Li gvidis instruistojn kaj lernantojn serĉi akvofonton kaj konstrui porkobredejon, kaj direktis lernantojn per sia sperto fari sciancan eksperimentadon por gajni riĉan rikolton de greno. Li ankoraŭ helpis instruistojn resumi sperton en la klasa kaj produkta bataloj kaj scienca eksperimentado en kamparo, por ke la lastaj senĉese perfektigu la instruajn materialojn kaj altigu instruan kvaliton. Post klopodo de kelkaj jaroj, nun tie starigis vicoj da novaj ruĝbrikaj lernodomoj, aperis kultiveblaj agroj peco post peco, kaj sur la antaŭa sovaĝejo prospere kreskas arboj persika, pruna, picea kaj paŭlovnia. La memproduktitaj greno, oleo, viandaĵoj kaj monrimedo mem-perlaborita povas fundamente kontentigi ilian bezonon. La glora tradicio de penema lukto de la Ruĝa Armeo floras ĉe la nova generacio.

# Neforgesebla Amikeco

**E**N aŭgusto, 1972, la delegacio de la ĉinaj ĵurnalistoj estis invitita al Rumanio, la bela kaj riĉa lando ĉe Danubo, por amikeca vizito. Dum preskaŭ duonmonata vizitado, ĉu en movplenaj urboj ĉu en pitoreskaj montvilaĝoj, ĉie ni povis vidi, ke la rumana popolo sinforĝese laboregas por la belaj kaj brilaj perspektivoj de la patrolando, kaj ĉie ni povis aŭdi laŭdojn pri la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Rumanio.


## “ĈINA VILAĜO”

En la nord-oriento de Bukareŝto troviĝas vilaĝo fame konata en la tuta Rumanio kiel “ĉina vilaĝo” pro la amikeco inter Ĉinio kaj Rumanio. Ĝi estas Munteni-Buzau-vilaĝo de Ialomita-gubernio — la sidloko de la Rumana-Ĉina Amikeca Agrikultura Kooperativo.

Ni vizitis tiun vilaĝon en la tria tago post nia alveno al Rumanio. Tiutage la gvidantaj kamaradoj de la vilaĝo kaj la kooperativo, kaj la vilaĝanoj malgraŭ pluvo renkontis nin sur la ŝoseo same kiel siajn parencojn. Je la intervidiĝo, la mastroj intime parolis kun ni kaj sciigis al ni, ke ses kamaradoj de la kooperativo jam vizitis Ĉinion. Ili alportis 103 speciojn de legomsemoj kaj grenoj al la malproksimaj kunbatalantoj — kamaradoj de la Ĉina-Rumana Popolkomunumo de Lugoŭkiaŭ en Pekino, kaj poste ili reportis el Ĉinio 105 speciojn de diversaj semoj. Frue en la lasta jaro la rumana bona specio de maizo “amikeco” jam donis riĉan rikolton en Ĉinio, dume ankaŭ la ĉinaj tomato, melongeno kaj fazeolo nun donis riĉajn fruktojn sur la tero de Rumanio.

Kamarado Chita, prezidanto de la kooperativo konigis al ni la sukcesojn akiritajn de la koopera-

*4,500-tonela varŝipo farata por Ĉinio de la rumana ŝipkonstruejo Galati*



tivo ekde ĝia fondiĝo kaj poste kondukis nin al la oficejo de la gvidantaj kamaradoj, kie oni vidis ĉinajn silkajn brodaĵojn sur muroj, albumojn kaj standardojn en ŝranko donacitajn de ĉinaj kamaradoj. Li rakontis al ni pri la donacaĵoj kaj ilia neforgesebla intervidiĝo kun ĉinaj kamaradoj. Li diris: "Sendube tiuj memoraĵoj estas belaj kaj ŝatataj de ni, tamen pli valora sur ili estas la amo kaj zorgo de la ĉina popolo al la rumana popolo."

Dum sia vizitado en la frata Rumanio la delegacio de la ĉinaj ĵurnalistoj ricevis varman akcepton ĉie, kien ĝi alvenis. Ilia sincera amikeco restos por ĉiam en nia memoro. Ni neniel povas forgesi la varman amikecon de la du rumanaj laboristoj en la urbo Arad, kiuj eksciis ke ni venis de Pekino, kiam ni haltigis nian aŭton por demandi pri la vojo. Ili insistis ke ni kune trinku pro la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Rumanio. Kiam la junaj gekooperativanoj venintaj de Sibiu hazarde renkontis nin en la hidroelektra stacio de Gheorghiu-Dej kaj informiĝis, ke ni estas amikaj senditoj de la ĉina popolo, ili tuj fervore invitis nin por esti kune fotografitaj por memoro. Neforgesebla estas ankaŭ la sincera kaj amika interparolo, kiun ni havis kun la ĉefa inĝeniero de laborista deveno en la fabriko de ole-industriaj ekipaĵoj en Ploiest "Unu-a de Majo". Li amikece imitis nin paroli "saluton" kaj "dankon" en la ĉina lingvo kaj samtempe esprimis, ke li sopiras viziti Ĉinion, ĉar ĝi estas vera amiko de la rumana popolo.

Plej memorinda por ni estas nia kortuŝa adiaŭado al la kamaradoj de la Rumana-Ĉina Agrikultura Kooperativo. Je la adiaŭo, la kamaradoj de ambaŭ landoj forte manpremis kaj ĉirkaŭprenis kuraĝigante unu alian, ke ili decidis kune marŝi antaŭen por la revolucia afero de la socialisma konstruado kaj batali kontraŭ la imperiismo ŝultron ĉe ŝultro.

## LA KONSTRUANTOJ DE AMIKECA PONTO

Ni veturis per aŭtoj okcidenten de Bukareŝto laŭ Karpatoj kaj atingis la gravan landliman urbon Arad en okcidenta Rumanio. Dum la tago ni regalis niajn okulojn per belaj pejzaĝoj. La majestaj Karpatoj kaj la senlimaj arbaroj ja estas mirinde belaj, sed same belega estas la amo de la tieaj diversnaciecaj rumanaj popoloj al la ĉina popolo.

La vagono-fabriko en Arad estas moderna entrepreno kun pli ol 10,000 diversnaciecaj laboristoj. Dum nia vizito, la gvidantoj de la fabriko diris multsignife: "Ĉinio kiel amiko de la rumana

popolo estas sufiĉe malproksima geografie, tamen ĝi estas tre proksima por niaj koroj, kvazaŭ ponto kunligus niajn du landojn." Kamarado Ion Mos, estro de la fabriko, sciigis al ni ankaŭ, ke kiam la Ĝenerala Asembleo de U.N. adoptis la rezolucion pri restarigo de la leĝa sidloko de la Ĉina Popola Respubliko en U.N., la laboristoj de nia fabriko okazigis mitingon por esprimi sian subtenon al la batalo de la ĉina popolo.

La popoloj de Ĉinio kaj Rumanio, apartigitaj de miloj da kilometroj da distanco, estas strikte ligitaj de la ponto de amikeco, formita en la longa revolucia batalo. La konstruantoj de la ponto de amikeco ĝuste estas la vastaj popolamasoj de ambaŭ landoj mem, kiuj reciproke simpatias, subtenas kaj helpas en la batalo kontraŭ imperiismo kaj por socialisma konstruado.

En la tagoj dum kiuj ni vizitis Rumanion, ni interkonatiĝis ankaŭ kun iu veterana laboristo kun 27-jara kompartianeco, kiu partoprenis la naciliberigan batalon. Li diris al ni ke li vivis kaj laboris du jarojn en Ĉinio dum la Granda Proletara Kultura Revolucio, kaj propraokule vidis en multaj lokoj la honestecon, justamon kaj revolucionan entuziasmon de la ĉina popolo. Li diris ankaŭ ke la ĉina popolo firme subtenas la revolucionajn ŝtormojn de naciliberigo kaj la batalojn por nacia sendependeco levigintajn en ĉiu ajn loko de la mondo.

Reveninte al sia patrolando, la veterana laboristo ofte konigis al siaj kamaradoj atingojn en la revolucio kaj konstruado de Ĉinio kaj rigardis tion kiel sian nerifuzeban devon. La aliaj rumanaj kamaradoj ofte demandis al li pri Ĉinio. "Ĉu la scivolemo instigis ilin fari tiom multajn demandojn?", diris al ni la laboristo. "Ne. Ĉar ili tre zorgas pri Ĉinio. Tio jam fariĝis komuna deziro inter nia popolo por pli multe scii pri Ĉinio kaj senĉese disvolvi amikajn rilatojn kun ŝia popolo."

## DEZIRO DE ŜIPKONSTRUISTOJ

Pli frue ol la destinita tempo ni ekiris de la gubernia urbo al la fama Galati-a Ŝipkonstruejo.

Antaŭ la ekiro ni jam informiĝis, ke sukcese surakviĝis la 4,500-tonela varŝipo fabrikita de la fabriko por Ĉinio. Pro nia trofrua alveno la respondecaj kamaradoj misprenis nin por la ĉina grupo, ankaŭ kiu devis atingi la fabrikon en la sama tago por akcepti la ŝipon. Kamarado Ion Tanase, sekretario de la partia organizo en la fabriko diris al ni sprite: "Jes, iuj el niaj kamaradoj miskonis vin en la komenco. Sed ni neniam era-

ros en tio ke ni certe donas varman akcepton al ĉiu ĉina kamarado el Pekino.” Kiam ni sciigis al la respondecaj kamaradoj de la fabriko, ke Hinhua-Novajagentejo kaj *Renmin Ribao* publikigis antaŭ nelonge informon pri la antaŭdata surakviĝo de la 15,000-tonela oceana ŝipo projektita kaj produktita de la laboristoj mem de ilia fabriko, kamarado Tanase diris ĝoje: “Dankon pro via subteno. Ni certe produktos por Ĉinio pli da ŝipoj kun granda tonelaro kaj alta kvalito kiel praktikan kontribuon por akceli la amikecon inter Ĉinio kaj Rumanio.”

“Praktika kontribuo por akceli la amikecon inter Ĉinio kaj Rumanio!” Tio estas komuna deziro de la laboristoj de la Galati-a Ŝipkonstruejo kaj la aliaj rumanaj laboristoj. Kiam ni surpaŝis la por Ĉinio faritan 4,500-tonelan varŝipon, inĝenero Ion Ilinski sciigis al ni, ke la rumanaj laboristoj

ĉiamaniere altigis la kvaliton de la ŝipo por helpi Ĉinion disvolvi oceanan transportadon. La laboristoj diris, ke ju pli alta estas la kvalito de la ŝipo, des pli profunda estas la amikeco inter Ĉinio kaj Rumanio. Tiajn vortojn plenajn de amikeco ni aŭdis ankaŭ en fabriko de ilmaŝinoj en Bukareŝto. La laboristoj de tiuj fabrikoj funkciigis por ni la novajn ekipaĵojn baldaŭ transportotajn al Ĉinio dirante emocie: “Kiam ni eksciis, ke tiuj maŝinoj estas farataj por Ĉinio, ni decidis fari ilin bonkvalitaj kaj transporti ilin sekure al Ĉinio, kiel ajn peniga tio estos.”

Ni profunde kredas, ke pli intimiĝos kaj firmiĝos la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Rumanio en la socialisma konstruado kaj en la komuna batalo kontraŭ imperiismo.

(La Delegacio de Ĉinaj Ĵurnalistoj)



## Vivu la Amikeco inter la Popoloj de Ĉinio kaj Laoso

—Pri vizito de la Ĉina Junula Delegacio al la liberigita regiono Sam Neua de Laoso

HIN HUA

**E**N septembro de 1972, la Ĉina Junula Delegacio invitita de la Laosa Patriota Junula Asocio faris amikan viziton al la liberigita regiono Sam Neua de Laoso. Ĉie kien ĝi iris, ĝi ricevis varman bonvenigon kaj amikan akcepton de tieaj junuloj, kadroj, soldatoj, laboristoj kaj kamparanoj. Sub la gvido de la Laosa Patriota Fronto, la armeanoj kaj popolanoj de Laoso brave rezistas kontraŭ la usona imperiismo kaj pene konstruas en malfaciloj ia liberigitajn regionojn. Iliaj heroaĵoj kaj revolucia spirito forte impresis la delegitojn. La revolucia amikeco kaj batala unuiĝo montritaj de la laosa popolo al la ĉina profunde gravurigiĝis en la koro de la membroj de la delegacio.

FOR VIDI ĈINAJN FRATOJN

Iun vesperon, la Laosa Patriota Junula Asocio okazigis solenan mitingon por bonvenigi la Ĉinan Junulan Delegacion. Ĝin partoprenis pli ol 1,000 kadroj, soldatoj, laboristoj kaj studentoj, kiuj venis en pluvego de foraj disaj lokoj. Kiam la prezidanto de la mitingo demandis la ĉeestantajn kamaradojn kotmakulitajn, ĉu ili lacas, ili ĉiuj diris, ke por vidi la ĉinajn fratojn ili ne sentas sin lacaj malgraŭ longa irado sur glitigaj vojoj tra altaj montoj. La mitingo estis plena de atmosfero de batala unuiĝo de la junularoj kaj popoloj de Ĉinio kaj Laoso. Tuj ekbolis la tuta kunvenejo

kaj longe daŭris manklakado kaj huraado, kiam la estro de la ĉina delegacio diris, ke la ĉinaj junularo kaj popolo ĉiam unuiĝos, batalos kaj venkos kune kun la frataj popoloj de Laoso kaj la aliaj landoj de Hindoĉinio, observante la instrukcion de sia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ĉiuj ĉeestantoj foje-refoje laŭte kriis: Vivu la revolucia amikeco kaj batala unuiĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj Laoso!

Tuj post la mitingo okazis amuza kunveno. Laosaj junuloj prezentis multajn artajn programerojn en originala nacia stilo, kiuj priskribas la bravan batalon de la laosa popolo en la naci-sava milito kontraŭ la usonaj agresantoj kaj ĝiajn heroaĵojn en konstruado de liberigitaj regionoj kaj varme prikantis la amikecon inter Ĉinio kaj Laoso. La junuloj de ambaŭ landoj kune aklamis, kantis kaj dancis. La kunveno daŭris ĝis profunda nokto. Adiaŭante, multaj laosaj kamaradoj premadis la manojn de la ĉinaj kamaradoj ne volante foriri de ili.

Plej kara estas la amikeco formita en batalado. Dum sia vizito la delegacio ĉie ĝuis la batalan amikecon. Foje, la delegacio vizitis heroan kompanion de la kontraŭaviadila trupo de la Laosa Popola Liberiga Armeo. La bataliono, al kiu apartenas la kompanio, batalis pli ol 400 fojojn kontraŭ aeratakoj kaj faligis 116 usonajn aeroplanojn. Pro tio ĝi plurfoje ricevis premiojn de la Centra Komitato de la Laosa Patriota Fronto kaj la Plej Alta Stabo de la Laosa Popola Liberiga Armeo. Kiam la delegacio atingis la pozicion, la kadroj kaj soldatoj de la kompanio entuziasme manpremis kun membroj de la delegacio kaj senĉese diris: “Bonvenon al vi, kunbatalantoj el


la postfronto! Vi alportas al ni subtenon kaj kuraĝigon de ĉinaj junularo kaj popolo.” Poste, subite pluvegis, sed ili daŭre interbabilis pri batala amikeco starante ĉirkaŭ kanono. La laosaj soldatoj prenis pluvmantelojn kaj metis ilin sur la ĉinajn kamaradojn. La ĉinaj kamaradoj kantis por la soldatoj “Kanton de Kontraŭaeratakaj Artileriistoj”. Kvankam iliaj vestoj estis tramalsekigitaj de pluvego, sed la koroj de la kunbatalantoj de ambaŭ landoj ligiĝas pli strikte.

## NEPRE RESANIGI LA ĈINAN KAMARADON

En la nokto, kiam la delegacio atingis Sam Neua, iu kamarado suferis de akuta apendicito. Laosaj respondecaj kamaradoj tre maltrankviliĝis pro tio. Ĝuste en tiu tempo eksonoris urĝa telefono. Ekparolis generalo Sipaseut, gvidanta membro de la Centra Komitato de la Laosa Patriota Fronto, kiu informiĝis pri tio kaj instrukiis, ke oni faru ĉion eblan por resanigi la ĉinan kamaradon.

En nokta nebulo flagradis lamplumoj, bruis motoro en montvalo kaj alrapidis aŭto kun kuracistoj kaj flegistinoj kun brankardo. Maltrankvilaj kaj varmaj mienoj kaj amzorgaj demandoj pri la sanstato — kiel profunda amikeco inter la kamaradoj de ambaŭ landoj!

Je la 2-a horo en la nokto, la malsanulo estis transsendita en la hospitalon de la Laosa Popola Liberiga Armeo. La hospitalo estas en ŝtonkaverno ĉe monttalo. Informiĝinte pri tio, ke la ĉina malsanulo venis, kuracistoj kaj flegistinoj de la hospitalo tuj rapidis al la deĵorĉambro spite al taga laco. Ĉiuj laborantoj tiel en la apoteko



*Laboristoj de fabriko de agrikulturaj instrumentoj en la laosa liberigita regiono en aktiva produktado.*



kiel en la operaciejo, streĉe laboris energioplene. Post streĉa laboro de 35 minutoj, la operacio finiĝis sukcese. Nur tiam ĉiuj laosaj kamaradoj sentis sin trankvilaj.

La sekvintan tagon, multaj kamaradoj venis unuj post aliaj al la malsanula ĉambro, por vidi kaj konsoli la ĉinan kamaradon. Inter ili estis gvidantoj de la Centra Komitato de la Laosa Patriota Fronto, reprezentantoj de oficejoj, trupoj, fabrikoj kaj lernejoj, kaj ankaŭ pacientoj en la hospitalo. Kun rida mieno, bukedoj kaj bananoj ili venis vidi la ĉinan malsanulon. La malsanulo kaj ĉiuj membroj de la delegacio estis kortuŝitaj de tio ĝis larmoj.

Sub la zorgema flegado de kamaradoj de la hospitalo, la paciento rapide resaniĝis kaj daŭrigis sian viziton.

## FADENO DE AMIKECO

Foje, ili venis al Nasi-vilaĝo de Xiengmieng-subdistrikto en pluvego. Kiam ili enpaŝis la vilaĝon, ili estis kortuŝita de la sceno, ke amaso da vilaĝanoj viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj kolektiĝis por bonvenigi la delegacion malgraŭ pluvego.

En la nokta lernejo ĉe la vilaĝfino, maljuna vilaĝestro rakontis al la delegacio la vilaĝan historion plenan de sango kaj larmoj. Antaŭ la liberiĝo, la popoloj de la vilaĝo suferis ekspluaton kaj ĉantaĝon de feŭdaj ĉefoj kaj vivis mizere kiel brutoj. Nelonge post la liberiĝo, usonaj imperiistoj bruligis ilian vilaĝon kaj detruis iliajn kampojn per bomboj. Malgraŭ tio la vilaĝanoj denove transloĝiĝis en siajn montvilaĝojn kaj replugis la kampojn. Ili kaj produktis kaj batalis, tiel ke ili ne nur akiris riĉan rikolton de greno, sed ankaŭ starigis lernejon. Ilia vivo boniĝas tagon post tago.

La delegacio vizitis familiojn de tieaj loĝantoj. La mastroj varme akceptis ĝin kaj okazigis laosan tradicion gratulan ceremonion de ligo per fadeno. Ĉiuj sidis ĉirkaŭ florkorbo, manĝis Zongzi-ojn\* kaj trinkis sakeon. Maljunuloj diris bondezirojn kaj ligis po fadenon sur la manoj de la membroj de la delegacio. Finliginte fadenon sur manon de la estro de la delegacio, iu pli ol 60-jara maljunulo diris kun profunda sento: Laoso kaj Ĉinio estas ligitaj per samaj monto kaj rivero. Vivu la amikeco ligita de la arĝenta fadeno.

Kiam la delegacio forlasis Nasi-vilaĝon, la amasoj akompanis ĝin ĝis fora loko. Maljunuloj multfoje deziris al ĝiaj membroj bonan vojaĝon. Infanoj firme tiris iliajn manojn kaj ne volis foriri. Iu maljunulo ĝoje kantis kanton verkitan de li mem:

*En Mekong-rivero ondas la senfina poezio,  
Longe vivu l' amikec' inter Laoso kaj Ĉinio.*

*\*Zongzi-o: Speciala manĝaĵo farita el glueca rizo, ordinare miksitaj kun jujuboj aŭ sukero pakitaj en fragmitfolioj k.s.*

## Prospera agrikulturo en la laosa liberigita regiono



*Laboristinoj de la presejo de la Laosa Patriota Fronto en streĉa laborado*



# Firma Subteno al la Justa Propono de la Latinamerikaj Landoj

LA 14-an de novembro, 1972, Gi Pengfej, ministro de eksteraj aferoj de Ĉinio, eksplicite esprimis al la ambasadoro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Meksikio al Ĉinio, ke nia registaro respektas kaj subtenas la justan proponon de Meksikio kaj aliaj latinamerikaj landoj pri starigo de sennuklea zono en Latinameriko. En sia noto, nia registaro solene deklaris, ke Ĉinio neniam uzos aŭ minacos uzi nukleajn armilojn kontraŭ la sennukleaj landoj kaj zono de Latinameriko, nek provos, fabrikos, produktos, tenados, instalos aŭ dislokos nukleajn armilojn en tiuj landoj aŭ en tiu zono, aŭ sendos siajn transportilojn kun nukleaj armiloj transiri la teritorion, teritorian maron kaj teritorian aeron de la latinamerikaj landoj. La noto de nia registaro al la meksikia registaro refoje enkorpigis la konstantan starpunkton de nia lando koncerne al la problemo de nukleaj armiloj.

Nia registaro ĉiam opinias, ke justa estas la postulo de multaj mezgrandaj kaj malgrandaj landoj pri starigo de sennuklea zono kaj paca zono por oponi kontraŭ la politikoj de agreso, ekspansio kaj militado de la superpotencoj. Ĉinio disvolvas iom da nukleaj armiloj nur por memdefendo kaj por rompi la monopoligon de nukleaj armiloj fare de la superpotencoj kaj finfine elimini ilin. Nia registaro jam deklaris al la tuta mondo antaŭ longe, ke en ĉiu ajn tempo kaj en ĉia ajn cirkonstanco Ĉinio ne uzos la unua nukleajn armilojn. Kvankam la Traktato de Malpermeso al Nukleaj Armiloj en Latinameriko kaj la Aldona Protokolo II jesis la rezoluciojn de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Traktato pri Nedisvastigo de

Nukleaj Armiloj kaj la Traktato de Malpermeso al Parta Nuklea Provo, kontraŭ kiuj Ĉinio ĉiam oponas, tamen por subteni la justan proponon de la latinamerikaj landoj pri starigo de sennuklea zono, nia registaro eksplicite prenis sur sin la devon. Krome, nia registaro faris garantion ankaŭ pri tio, ke ni ne sendos niajn transportilojn kun nukleaj armiloj transiri la teritorion, teritorian maron kaj teritorian aeron de la landoj de tiu regiono, pri kio la traktato ne kondiĉis. Tiu ĉi principa starpunkto estas forta subteno al la bona volo de multaj landoj, kiuj postulas starigon de sennuklea zono kaj paca zono.

En la lasta Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, sovetuniaj delegitoj bele babilis pri “neuzo de fortoj” kaj “malpermeso por ĉiam al uzado de nukleaj armiloj”, sed kiam ili ektuŝis la problemon de starigo de sennuklea zono en Latinameriko, ili tuj haltis. Sur la podio de la Ĝenerala Asembleo sovetunia delegito A. Roŝin ne kuraĝis preni sur sin la devon sin pravigante per argumento post argumento. Sovetunio alprenis tiun sintenon nur pro tio, ke starigo de sennuklea zono en Latinameriko malfavoros al ĝia politiko de nuklea minaco kaj nuklea ĉantaĝo. Tiamaniere, Sovetunio pluapaŝe malkaŝis sian artifikon de falsa malar-mado per sia propra ago.

La volo de la latinamerikaj landoj devas esti respektata. Por vere efektiviĝi la proponon de la latinamerikaj landoj pri starigo de sennuklea zono, oni nepre devas batali kontraŭ la politiko de nuklea ĉantaĝo kaj nuklea minaco praktikata de la superpotencoj.



## LA SOVETUNIA KAJ USONA REPRESENTANTOJ BELIGIS LA T. N. "TRAKTATON PRI NEDISVASTIGO DE NUKLEAJ ARMILOJ"

La 31-an de oktobro, 1972, la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj diskutis la jaran raporton de la Internacia Agentejo de Atoma Energio, ĉe kio la sovetunia kaj usona reprezentantoj en kompleto beligis la t. n. "Traktaton pri Nedisvastigo de Nukleaj Armiroj".

En sia parolado la sovetunia reprezentanto A. Roŝin fanfaronis la sovetunian aserton pri nuklea malarmado kaj malpermeso de nuklea provo. Li diris, ke la traktato donos eblecon al sennukleaj landoj, kiuj partoprenis en ĝi, ĝui la fruktojn de paca uzo de nuklea energio.

La usona reprezentanto G. Buŝ ankaŭ urĝigis

"tiujn landojn, kiuj ankoraŭ ne partoprenis en la 'Traktato pri Nedisvastigo de Nukleaj Armiroj', kiel eble plej rapide aliĝi al tiu traktato".

La ĉina reprezentanto Ĉen Ĉu emfazis en sia parolado: "La tiel nomata 'Traktato pri Nedisvastigo de Nukleaj Armiroj' sin prezentas granda trompo kune projektita de Usono kaj Sovetunio por konservi ilian nuklean monopolon, nuklean hegemonion kaj nuklean ĉantaĝon. La ĉina registaro kaj la ĉina popolo firme oponas kontraŭ tiu ĉi traktato."

La albana reprezentanto ankaŭ esprimis en sia parolado firman oponon kontraŭ la traktato.

## 7 MALAMIKAJ BATALIONOJ ESTIS GRAVE VUNDITAJ KAJ EKSTERMITAJ

La Sudvjetnama Liberiga Novaĝ-agentejo raportis, ke la liberiga armeo de la meza regiono de la meza Sudvjetnamio konkeris, de la fino de oktobro ĝis la komenco de novembro, 1972, 7 bazlokojn kaj militajn branĉajn regionojn kaj ekstermis kaj grave vundis 7 batalionojn de la malamiko, en provincoj Quang Nam, Quang Ngai, Kom Tum kaj Gia Lai.

*Popolanoj de la gubernio Trieu Phong de Quang Tri varme bonvenigas batalantojn de la liberiga armeo.*



## SOVETUNIO DAŬRE FARIS NOVAN SUBTERAN NUKLEAN PROVON

En la 2-a de novembro, 1972, la Sismologia Instituto en Uppsala de Svedio registris, ke Sovetunio faris novan subteran nuklean provon egalan al intenseco de giganta tertremo en la Semi-palatinska eksperimenta areo en Siberio. Laŭ la analizo de la instituto, tio estas provo kun la plej forta grado farita de Sovetunio en la areo.

Statistiko montras, ke Sovetunio antaŭe jam faris 70 subterajn nukleajn provojn depost kiam ĝi subskribis kun Usono kaj Anglio la Traktaton de Malpermeso al Parta Nuklea Provo, en Moskvo je la jaro 1963. Ĉifoje estas la 71-a eksplodo registrita.

## TRI USONAJ AVIADILOJ ESTIS FALIGITAJ

La Vjetnama Novaĵ-agentejo informis, ke la armeanoj kaj popolanoj de la provinco Nghe An de la norda Vjetnamio faligis tri usonajn aviadilojn inkluzive de unu aviadilo B-52 kaj vundis tri usonajn militŝipojn respektive je la 3-a, 5-a kaj 6-a de novembro, 1972.

*Usono intensigas sian transportadon de militaj ekipaĵoj por armi la sudvjetnaman pupan klikon.*



*Legitimiloj de du usonaj aviadistoj mortigitaj de armeanoj kaj popolanoj de la provinco Vinh Phu de norda Vjetnamio.*

## LA USONA REGISTRARO INTENSIGAS ARMADON AL LA SUDVJETNAMA PUPA KLIKO

La usona registaro daŭre transportas al la sudvjetnama pupa klico militajn provizojn, kiaj bataljetoj, ŝarĝaviadiloj, helikopteroj, tankoj kaj militŝipoj.

Laŭ la raporto de okcidenta novaĵ-agentejo, la pentagona preparolanto Jerry W. Friedheim konfesis en la 3-a de novembro, 1972, ke Usono rapidigas transportadon de militaj provizoj al la sudvjetnama pupa klico. Li sofisme diris: "La livero

de novaj armiloj estas subteno al la klopodoj por intertrakti pacan solvon". A P raportis, ke Usono intensigas transportadon de militaj provizoj al la sudvjetnama pupa klico, tiel ke "plimultiĝos la sudvjetnama (pupa) aera forto ĝis pli ol 2,000 aeroplanoj". Reuter-agentejo informis, ke la usona "vjetnamiga" plano "estas nun en la grava aerarmea fazo".

Krom diversspecaj aviadiloj la usona registaro transportas al la saĝona pupa klico ankaŭ tankojn, kirasaŭtojn, militŝipojn kaj aliajn militilojn. Reuter-agentejo diris, ke Saĝono "eble ricevos pli da modernaj militŝipoj el la usona mara armeo".



# Lotussemoj

## Portas Amikecon

**E**N sia artikolo "La Lotussemoj de Sun Ven", japana verkisto Furukava Kaolu skribis, ke novajn fruktojn donis semo simbolanta la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio transportita de la ĉina granda revolucia antaŭulo S-ro Sun Ven (D-ro Sun Jatsen).

En la jaro 1918, kiam D-ro Sun Jatsen loĝis en Japanio, li donacis al S-ro Tanaka Takaŝi kvar antikvajn lotussemojn trovitajn de ĉinaj arkeologoj por danki lian amikecon. La lasta ĉiam bone tenis ĉe si tiujn memo-


raĵojn simbolantajn la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio, kaj ilin daŭre konservis liaj familianoj post lia forpaso.

En la jaro 1960, liaj familianoj informiĝis ke ankaŭ antikvaj lotussemoj povas burĝoni, ili do transdonis la kvar semojn al alia japana amiko por ke li kulturu ilin. Fine unu el ili burĝonis kaj plene kreskis kun belaj floroj kaj dikaj semoj.

En oktobro de 1972, kiam la Literatura Delegacio de Jamaguĉi-gubernio estis vizitonta Ĉinion, Doktoro Tanaka Takahiro, la

filo de S-ro Tanaka Takaŝi, elektis kvar novajn semojn de tiu lotuso kaj komisiis al la delegacio porti ilin al la ĉina popolo.

La ĉina popolo donas grandan atenton al tiuj semoj spegulantaj la amikecon kaj kulturen interŝanĝon inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio. Jatsen-parko de Pekino kulturos tiujn kvar karajn lotussemojn en tiu ĉi printempo. Ili certe floros kaj fruktos sur la ĉina tero, same kiel la amikeco inter la du popoloj.




### Kurantaj Aferoj

#### NOVA DISVOLVIĜO DE LA ĈINA KEMISTERKA INDUSTRIO

Stabile leviĝas nia kemisterka produktado en 1972. La ŝtata produkta plano de tia sterko de ĉiu monato antaŭ oktobro estis superplenumita. La totala produktokvanto multiĝis je 33 procentoj ol tiu en la sama periodo de 1971, kaj la kvalito estas stabila. La konsumata proporcio de krudaj materialoj, brulaĵoj kaj elektra energio malaltiĝis ol tiu en la sama periodo de 1971, kaj malaltiĝis la produktokosto.

*Bonkvalita fosfora sterko produktita de la Ĝangiang-a Kemia Fabriko en Guangdong-provinco.*



Dum daŭra altigo de la produkta nivelo de grandaj kaj mezgrandaj fabrikoj, granda kvanto da teknikorenovigaj laboroj estas faritaj en malgrandaj fabrikoj de nitrogena sterko. Ĝis septembro de 1972, sepono de tiaj fabrikoj de la tuta lando jam plenumis teknikan renovigon. Niaj malgrandaj fabrikoj de nitrogena sterko estas starigitaj en la granda antaŭensalto de 1958, ili fariĝis unu el la gravaj fortoj por subteni agrikulturon post senĉesa disvolviĝo kaj fortikiĝo dum la lastaj pli ol dek jaroj. Ilia totala produktokvanto en 1971 jam okupis 43 procentojn de tiu de la tuta lando

En la unuaj naŭ monatoj de la jaro 1972, aliaj pli ol cent malgrandaj kaj nombro da grandaj kaj mezgrandaj kemisterkaj fabrikoj ekfunkciis en la tuta lando, kio pluaparte grandigis la produktivon de nitrogena, fosfora kaj kalia sterkoj.

## BEJĜEN-A FLAV-RIVERA PONTO KONSTRUIGIS

Ponto super la Flava Rivero en Bejĝen, Ŝandong-provinco, jam estis sukcese konstruita kaj inaŭgurita por trafikado.

La ponto 1,394 metrojn longa, konsistanta el la ĉefa parto el ŝtalaj traboj kaj la alkondukaj partoj el antaŭpremita armita betono, estas la plej longa aŭtovoja ponto nun super la Flava Rivero de nia lando. Tri kamionoj povas samtempe ĝin trapasi flankon ĉe flanko. Kaj en ĝiaj ambaŭ flankoj estas trotuaroj 1.5 metrojn larĝaj. La finkonstruo de la ponto kunligis la aŭtovojojn en ambaŭ bordoj de la Flava Rivero kaj havas gravan signifon por akceli la disvolviĝon de la industria kaj agrikultura produktado en Ŝandong-provinco.

*Bejĝen-a Flav-rivera Ponto de Ŝandong-provinco*





# Nova Aspekto de Vejŝan-lago

Fiŝboatoj sur Vejŝan-lago

Vejŝan-lago, unu el niaj famaj sensalakvaj lagoj, situas en la sudokcidenta parto de Ŝandong-provinco, kun pli ol 1,400 kvadrataj kilometroj kaj riĉaj produktaĵoj.

Aktive praktikante la principon **“plenamplekse disvolvi produkton kun tiu de greno kiel ĉefĉenero”**, la popolanoj ĉe la lago disvolvis la fiŝadan, agrikulturan kaj aliajn flankokupajn produktojn al nova nivelo. Sur la 10,000 hektaroj da ofte inundataj malaltaj kampoj oni plantis rizon post irigacio per lagakvo kaj akiris riĉan rikolton.


La eksperimenta dolĉakva fiŝbredejo de Vejŝan-lago sukcesis en arta genero de molŝela testudo (*Trionyx sinensis*), kiu povas uziĝi kiel drogo kaj nutroza manĝaĵo.





Riĉa rikolto de rizo en malalta kampo antaŭe inundiĝema

Anasoj de Vejŝan-lago kun bongusta viando kaj alta demetivo de ovoj





Komunumanoj de Liuĝuang-komunumo  
ĉe Vejŝan-lago kolektas eŭrialojn (*Eur-  
yale ferox*), kies grajno estas drogó  
utila al lieno kaj stomako.






En la nordorienta antaŭurbo de Ĉongking, Siĉuan-provinco, troviĝas artefarita Ĉangŝou-lago. En la jaro 1958, tie estis establita fiŝbredejo, kiu nun povas liveri ĉiujare pli ol 1,150,000 kilogramojn da freŝaj fiŝoj.

## Produkto de Kulturperloj

La Modela Kulturejo de Tiangia, Hintian-gubernio, Hunan-provinco, sukcesis en eksperimentado pri kreskigo de kulturperloj utiligante la lokajn akvo-produktajn rimedojn. Perlo estas kara drogo kaj ornamaĵo.

Laboristinoj faras greftadon por kreskigi kulturperlojn.






Angulo de la fiŝbredejo en Ĉangŝou-lago



Laboristoj kaj oficistoj de la bredejo esploras pri la fiŝoriĉeco en la akvorezervejo kaj interkonsiliĝas por ĝia multigo.



Kulturperloj de la Modela Kulturejo de Tiangia



Teknikisto Sun Ŝijan eksplikas pri la tekniko de kreskigo de kulturperloj al la komunumanoj alvenintaj por lerni tiun teknikon.



Freŝaj fiŝoj

# Greno

(*novelo*)

Tio okazis en la lasta vintro.

Peza neĝo obstrukcis la montajn vojojn kaj la altaj montoj surmetis al si arĝentan kirason.

Proviantisto Meng Kingfu laŭte kriis al la telefona parolilo: "Haloo, ĉu kamarado sekciestro? Pasis jam du tagoj post nia alveno al Kingfenggang kaj nemulto restas el nia kunportata greno. Kio?... Jes, niaj ĉevalĉaroj alportos. Kio? Prepariĝi por eventuala prokrastiĝo de la alportota greno, jes, jes! O, jes.... Serĉi fratinojn Ĝang? Jes, mi raportos al vi pri la rezulto."

La proviantisto metis la parolilon, ĵetis rigardon eksteren kaj rimarkis, ke denove falas densaj neĝflokaj. Li malpacience gratis sian kapon kaj murmuris al si mem: "Vere malamika estas la vetero!" Efektive, jam neĝadis kvar tagojn kaj la montvojoj estas obstrukcitaj. La sekciestro diris, ke li prunteprenu grenon por eventuala bezono, se la transporta taĉmento ne povos veni portempe. Tamen konsiderante, ke en Kingfenggang loĝas nur ĉirkaŭ 40 familioj, li dubis, ĉu li sukcesos pruntepreni tiel multe da greno. Kaj....

Kiam la proviantisto estis en embaraso, la pordo puŝmalfermiĝis kun knaro. Enpaŝis virino ĉirkaŭ tridek-jara. Ŝi estis la estrino de la produkta grupo de Kingfenggang. Ŝin sekvis onklino kun multaj neĝflokaj sur sia arĝenta hararo.

"Ĉu vi venas por io, kamaradino Song?"

"Kompreneble mi venas ne senkaŭze. Farante militiran ekzercon, la armeanoj devas pene batali kontraŭ multaj malfaciloj. Se la kamaradoj dume povus ricevi nur kaĉon kaj tio ne dolorigus la koron de kamarado proviantisto," diris maŝinpafile la onklino, antaŭ ol grupestrino Song respondis, "tio tamen dolorigus mian koron."

Ĉi-matene, la proviantisto proponis al la kompaniestro kaj politika direktanto, ke la trupo manĝu kaĉon anstataŭ rizaĵon, por ŝpari grenon. La propono estis akceptita. Kvankam oni ankoraŭ

ne tiel faris, tamen la proviantisto iom ĉagreniĝis. Nun aŭdinte la kritikon de la onklino, li sentis ankoraŭ pli akran memriproĉon. Li tuj faris memkritikon antaŭ la grupestro kaj la onklino, ke li ne bone plenumis sian laboron.

La onklino ekridis kaj diris: "Vi ja devas fari memkritikon, kamarado proviantisto! Kial vi ne interkonsiliĝis kun la amasoj por solvi la malfacilon?" Kaj grupestro Song diris: "Ho jes, kial vi ne diris al ni, ke al la trupo mankas greno? Se la onklino ne informiĝus pri tio, ni ne sciis kio okazis!"

"Ni volis laŭeble ne ĝeni la amasojn," diris la proviantisto.

"Ne maltrankviliĝu pro tio. Ni jam pensis pri tio, kiam ni alportis legomojn al la trupo." Kaj poste grupestro Song daŭrigis: "Kiom da greno la trupo bezonas?"

Estis videble, ke la helpemo estas nerifuzebla kaj krome la trupo vere bezonis grenon, sekve la proviantisto diris: "Faru laŭ via kapablo. Sufiĉos centoj da kilogramoj. Nepre ne influu la vivon de la amasoj. Kiam greno estos alportita al la trupo, ni tuj redonos la prunteprenitan al la amasoj."

"Bone, mi iros sciigi al la familioj, ke oni portu grenon ĉi tien."

"Ne alportu, mi iros kun la kuiristoj al ili por preni," haste diris la proviantisto.

"Ankaŭ bone. Onklino, unue vi iru fari sciigon, kaj iom poste mi iros kune kun kamarado proviantisto."

"Do mi iras sciigi." Tion dirinte la onklino rapide iris el la pordo kaj malaperis inter la densaj flirtantaj neĝflokaj.

"Kiu estas tiu ĉi onklino?..." demandis la proviantisto.



“Ĉi ja estas la fame konata onklino Ĝang Ĉunven, la ĝuanto de kvin garantioj\*, pri kiu mi parolis.”

“Onklino Ĝang?”

“Antaŭe ŝia hejmo estis nia sekreta komunika stacio kaj niaj nemalmultaj vunditoj kuraciĝis en ŝia hejmo.”

“Ha, vere estas revolucia onklino!” admiris la proviantisto. “Grupestro, ni do ne prunteprenu de familio, kia tiu de onklino Ĝang, ĉu bone?”

“Mi ne malkonsentas pri via opinio, tamen vi mem devas klopodi por persvadi ŝin.” La grupestro ĵetis rigardon al la proviantisto kaj diris kun rideto.

“Kial?”

“La temperamento de onklino Ĝang ja estas konata de ĉiuj, ke ŝi neniam restas postĝinta en tia afero.”

“Do ni iru unue al la hejmo de onklino Ĝang.”

Grupestro Song kondukis la proviantiston al la hejmo de la onklino piedirante en neĝado. La onklino ankoraŭ ne revenis.

Apenaŭ ili sidiĝis, la onklino revenis anhelante kun neĝeroj sur la tuta korpo. La proviantisto tuj stariĝis kaj iris renkonte al ŝi. “Kiom vi laciĝis, onklino! Sidiĝu por iom ripozi.”

“Tute nenecese! Ni montanoj ja kutimiĝis al montgrimpado. Mi jam sciigis al ĉiuj, ke ili portu grenon al tiu ĉi loko, por ke la trupo povu facile forpreni. Jen listo pretigita de la librotenisto. Vi kontrolu per ĝi la ricevotajn kvantojn de greno.” La onklino elpoŝigis paperslipon kaj ĝin donis al li.

La proviantisto prenis la liston kaj trovis je la ekrigardo, ke sur ĝi nete skribiĝis la nomoj de la pli ol 30 famliestroj kaj la kvantoj de greno pruntedonataj. Li estis tre mirigita de tio, ke en la unua linio troviĝis jenaj vortoj:

Ĝang Ĉunven                      50 kilogramoj

“Onklino, ĉu tio ĉi estas via nomo?” La proviantisto diris kun timo, ke li misvidis.

“Tute certe! En Kingfenggang nur mi havas la familian nomon Ĉang.”

“Ĉu vi povas pruntedoni tiel multe?” la proviantisto tuj demandis plue.

“Mi skribis malpli multe ol mi povas pruntedoni!”

“Grupestro Song, ĉu...” diris la proviantisto rigardante la grupestron, dezirante ke ŝi diru sian opinion.

“Onklino Ĝang estas plej sincera kaj neniam hipokrita,” diris grupestro Song.

“Ho, ĉu vi ankoraŭ ne kredas vian onklinon? Nu, mi montru al vi mian havaĵon!” Malgraŭ dekonsilo de la grupestro kaj proviantisto, ŝi komencis montradon. Ŝi malfermis sian ŝrankon kaj diris montrante al la greno en ĝi: “Jen, kvar sakoj kun totala pezo de 100 kilogramoj.” Li demovis la tegilon de sia fajenca vazego kaj montriĝis ke ĝi plenas de flava milio. “Jen estas 75 kilogramoj da milio.” Kaj tiam li montris vazojn de diversaj formoj kaj grandecoj plenajn de diversaj specoj de grenoj. Nun la onklino levis la tolan kurtenon, ke la proviantisto rigardu en la

internan ĉambron, kie greno estas metita sur framo por eviti malsekecon.

La proviantisto diris kun miro: “Onklino, mi vere ne atendis, ke vi akumulis tiel multe da greno!”

“Sciuj, ke ĉiĵoj ni tute ne tuŝis la rezervatan grenon de la kolektivo kaj ĉiu familio tenas por si sufiĉe da greno por sia konsumo. Nun vi kredas min?”

“Kiel vi povas havi tiel multe da greno en rezervo?” la proviantisto demandis scivoleme.

Onklino Ĝang sidiĝis kaj rakontis okazintaĵon antaŭ dudek kvar jaroj. “Tiam en mia hejmo loĝis tri vunditoj de la liberiga armeo. Kiam malamikoj venis por traserĉo, mi translokiĝis ilin en kavernon kaj preparis por ili manĝaĵojn por du tagoj. Sed la malamikoj ankoraŭ ne foriris post kvintaga restado en la vilaĝo. Pro zorgo pri la kamaradoj kun malplena stomako en la kaverno, mia koro doloris al mi, kvazaŭ pikite de glavo. Sed de kie mi povus akiri grenon? Mi malfacile akiris kelkajn legomajn panojn, kiujn mi volis porti al la kamaradoj post vesperiĝo. En tiu nokto, mi aŭdis frapadon sur la pordo. La signalo atentigis al mi, ke tio estas niaj homoj. La pordo malfermiĝis kaj envenis vundito. Ankaŭ li estis proviantisto. Mi tuj helpis lin enpaŝi en la ĉambron. Mi ekrigardis lin kaj trovis, ke li multe malgrasiĝis. Eble pro malsato? Mi ĉagreniĝis kaj eklarmis. La proviantisto diris: ‘Kial vi ploras, bofratino? Ĉu mi ne fartas bone?’ Mi elprenis la malvarmajn legomajn panojn kaj diris: ‘Prenu, kamarado!’ Li rigardis min kaj levis la tegilon de mia kaldrono kaj vidis, ke kuirigis en ĝi supo de sovaĝaj legomoj. ‘Bofratino,’ li diris, ‘vi tenu ilin por vi. Ni mem povas iel solvi nian malfacilon.’ Li flanken ŝovis miajn manojn, returnis sin kaj foriris. Mi volis postkuri lin por doni al li la legomajn panojn, sed oraj fajreroj aperadis en miaj okuloj, malfortiĝis miaj kruroj kaj mi sidiĝis sur la sojlo...” La onklino diris suspirante: “Tiam la greno de la terkulturistoj tute eniris en la grenejojn de la riĉuloj. Se tiam ni havus grenon en rezervo kiel nun, kiel ni povus lasi la kamaradojn tiom suferi!” Malsekiĝis la okuloj de la onklino.

Grupestro Song klarigis aldone: “Post kiam Prezidanto Maŭ elmetis la alvokon sin prepari kontraŭ milito, sin prepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo, onklino Ĝang jam komencis zorgi pri tio.

La proviantisto estis profunde kortuŝita de la

konduco de la onklino. Li diris: “Ni lernos de vi, onklino!... Bone, ni do prunteprenu 50 kilogramojn de vi.”

“Jen prava decido! Mi tuj faros preparon.”

Tuj post kiam onklino Ĝang iris en la domon, komunumanoj alvenis unuj post aliaj, portante grenon al la domo de onklino Ĝang, iuj surŝultre, aliaj per puŝĉaroj kaj triaj per portvektoj kaj korboj.

“Mengĉjo, kontrolu ĉu la kvantoj estas ĝustaj.”

“Proviantisto Meng, mi aldonis 25 kilogramojn.”

Ĉiuj ĉirkaŭis grupestron Song kaj la proviantiston kaj varme interparolis. Onklino Ĝang petis junulon, ke li helpu ŝin elporti ŝian grenon. Post pesado oni konstatis, ke la totala kvanto de la alportita greno estas centojn da kilogramoj pli granda ol tiu en la listo.

La proviantisto Meng Kingfu tuj telefonis al sia estro: “Ĉu kamarado sekciestro?... Kingfenggang ne nur povas provizi la bezonon de unu kompanio, laŭ mia opinio, ĝi eĉ povas vivteni tutan armeon!”

“Bone! Greno estos alportita al vi postmorgaŭ kaj tiam tute redonu la prunteprenitan kvanton al la amasoj!” Klare aŭdiĝis la voĉo de la maljuna sekciestro.

“Jes!”

“Haloo, ĉu vi jam ricevis informon pri bofratino Ĝang laŭ mia peto?”

“Ha, tion mi forgesis! Tamen mi havas liston, en kiu troviĝas nur unu grizhara onklino Ĝang, jam pli ol sesdekjara... Jes, ŝi nomiĝas Ĝang Ĉunven.”

“Ĝuste ŝi, ĝuste ŝi! Stulta knabego, forpasis pli ol dudek jaroj, ĉu bofratino ne ŝanĝiĝas en onklinon? Ha ha!” La maljuna sekciestro ekridis plengorge.

“Sekciestro, vi loĝis ĉe ŝi pro vundo, ĉu ne?” La proviantisto subite saĝiĝis. “Kamarado sekciestro, ĉiĵoj mi ne nur konis ŝian nomon, sed ankaŭ vere konis ŝian personon, konis la popolamasojn kun alta konscio... Jes! Onklino faris novan kontribuon!” Vere emociiĝis la proviantisto, ke li preskaŭ elkriis la lastajn vortojn.

---

*\*Senlaborkapablaj vidvoj, vidvinoj, kripluloj kaj orfoj prizorgataj de popola komunumo en elspezoj por manĝaĵoj, vestoj, kuraco, loĝado kaj entombigo.*

# Kanto pri la Socialisma Patrio

Moderato Grandioso


Vortoj kaj muziko de Vang Hin



Flir- tas



ru- ĝa l' flag' kvin- ste- la, kant' re- vo- lu- ci- a laŭ- tas en l'a-



er'. Kan- tas ni l' so- cia- lis- man pa- tri- on, ki- e




o- re bri- le- gas la sun- sfer'. Ni- a gran- da gvi- dan- to



Maŭ- Ze- dong, nin kon- du- kas en mar- ŝo al la cel'.






mar- ŝo al la cel'.

Tra la mon- tar', tra l' ebe-  
La pro- le- ta- ra kul- tur-re-vo-lu-  
Pen- se al pa- tri', vi- de al la



naĵ', ku- ras Jang- zi kaj l' Fla- va Ri- ver'. Tu- ta la  
ci'— no- va marks- le- nin- is- ma po- e- zi'. Ple- nas la  
mond', stre- bas ni al la ko- mu- nismes- tont'. Glo- ra la



po- pol' kun gran- da vol', so- cia- lis- ma pa- tri- o  
po- pol' je viv- e- ner- gi', for- te kres- kas la no- va  
gran- da Kom- par- ti' es- tas la gvi- dan- ta



en pros- per'. La po- pol' kaj ar- me' li- gi- ĝas ki- el  
ge- ne- ra- ci'. Pre- zi- dan- to Maŭ nin gvi- das en ba-  
kern' por ni- a rond'. Maŭ- ze- dong- pen- so, bril- ra- di- a



fer'. Kiu in- va- dos nin, tiun ni sen- dos al in- fer'. Flir- tas  
tal', ru- ĝan es- ton- te- con mal- fer- mos cer- te ni.  
font', mon- tras al ni l' ce- lon en fo- ra ho- ri- zont'.



# Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang — Gvidantoj de Kamparana Insurekcio

ŜI BING

**E**N la jaro 221 a. K., la unua imperiestro de Kin-dinastio unuigis Ĉinion kaj fondis feŭdan ŝtaton de absolutismo kaj centralizismo. Depost la surtroniĝo de lia filo Kin la Dua, feŭdaj regantoj intensigis siajn ekspluatadon kaj subpremadon al la kamparanoj. La pezaj imposto kaj servuto, kruela puno ĵetis milojn kaj dekmilojn da laborantaj popolanoj en malsaton kaj morton. La senluma regado pli akriĝis klasajn kontraŭdirojn.

En julio, 209 a. K. (la unua jaro de Kin la Dua), dungita kamparano Ĉen Ŝeng kaj malriĉkamparano Vu Guang kune kun aliaj 898 malriĉaj kamparanoj estis perforte senditaj al punlaboro. Vipate de la oficiroj, ili tage kaj nokte marŝis norden de la baseno de Huaj-rivero al Jujang (sudokcidente de la nuna Mijun-gubernio de Pekino). Survoje ili renkontis senĉesan pluvegon. La kota vojo estis tiel malfacile irebla, ke ili eĉ ne povis movi siajn piedojn antaŭen. Tial ili devis halti en Dazehiang (la nuna Suhian-gubernio de Anhuj-provinco) kaj ne povis atingi Jujang en la ĝusta tempo. Laŭ la leĝo de Kin-dinastio, ili devis esti kondamnitaj al morto pro tio. Vizaĝe al minaco de morto oni

mallaŭte kaj maltrankvile interparolis, kaj la malamo nova kaj malnova ŝveliĝis en ilia koro.

Iun vesperon Ĉen Ŝeng ŝtele konsiliĝis kun sia malriĉa amiko Vu Guang. Li diris: “Nun ni neniel povos atingi Jujang en la ĝusta tempo, ni ne devas atendi morton senfare. Tiel aŭ aliel ni ribelu kaj batalu ĝis morto.” Vu Guang tute konsentis pri tio kaj ili decidis tuj organizi insurekcion.

En kelkaj tagoj ili jam plene ekscitis profundan malamon de aliaj fratoj al Kin-dinastio, aplikante lertajn metodojn akcepteblajn por la lastaj. Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang mortigis la eskortantajn oficirojn. Poste Ĉen Ŝeng tuj deklaris insurekcion. Subite, sur teraso de Dazehiang alte flirtis ribela flago. Kun bambuaj stangoj, bastonoj, vektoj, falĉiloj kaj ŝpatoj en la mano la ribelantoj decidis konduki sangoverŝan batalon kontraŭ Kin-dinastio. Naŭcent malriĉaj kamparanoj elektis Ĉen Ŝeng kiel generalon kaj Vu Guang kiel subgeneralon. Tiel komenciĝis potence la unua kamparana revolucia milito en la historio de nia lando sub la gvido de Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang.

*Sub la gvido de Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang, la malriĉaj kamparanoj ribelis, prenante bambuan stangon kaj bastonon kiel armilon, kontraŭ la krima regado de Kin la Dua.*



Tiu armeo plena je revolucia entuziasmo kaj braveco, ĉiamvenke batalis kontraŭ la bone armita bienula trupo kaj rapide okupis kelkajn urbojn kaj urbetojn en la nunaj Anhuj- kaj Henan-provincioj. Kien atingis la insurekcia armeo, tie la ekspluatataj kaj subpremataj kamparanoj tuj mortigis reakciajn oficistojn kaj aliĝis al la armeo. Iuj el ili venis eĉ kun greno.

Kiam la insurekcia armeo atingis Ĉenhian-gubernion (la nuna Huajjang-gubernio de Henan-provincio), ĝi jam fariĝis potenca kamparana armita forto havanta 600-700 militĉarojn, pli ol 1,000 kavalerianojn kaj dekmilojn da infanterianoj. Subtenate de amasoj, Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang decidis fondi tie la unuan kamparanan revolucion regpotencon en la historio de nia lando, klare elmetis revolucion sloganon "Puni tiranojn kaj renversi la kruelan Kin-dinastion", kaj per tio mobilizis milojn kaj milojn da malriĉaj kamparanoj al la batalo por ruinigi la feŭdan absolutisman Kin-dinastion. Ĉenhian-gubernio tiam servis kiel la centro de la kamparana revolucio.

Por renversi la regadon de la bienula klaso de Kin-dinastio, Ĉen Ŝeng ekspedis sian armeon en kelkaj kolonoj al atako, unu el kiuj sub la komando de Vu Guang atakis la gravan strategian lokon Hingjang de Henan-provincio, kaj la alia sub la komando de Ĝoŭ Ven, alia gvidanto de la insurekcia armeo, sturmis tra Mianĉi kaj Hanguguan-pasejo, kaj fine ĝis la antaŭurbo de Hianjang (oriente de la nuna Hianjang-gubernio, Ŝenhi-provincio) — la nesto de Kin la Dua.

La konfuzita Kin la Dua haste kolektis centmilojn da reakciaj armeanoj kaj faris frenezan reatakon al la kamparana armeo. Ĝuste en tiu kriza momento bienuloj kaj aristokratoj sin kaŝantaj en la insurekcia armeo respektive okupis favoran lokon kaj rifuzis ekspedi siajn trupojn por helpi la armeon de Ĝoŭ Ven, tiel ke Ĝoŭ Ven heroe sin oferis en la milito kaj lia armeo malvenkis en la atako. La imperiestra armeo daŭre marŝis orienten por fari reatakon. Sub tiu cirkonstanco la kamparana armeo splitiĝis interne, Vu Guang, unu el la fondintoj de la insurekcia armeo, estis mortigita, kaj lia armeo ankaŭ fiaskis, tiel ke la revolucia forto multe reduktiĝis.


La situacio estis tre malfavora al la revolucio. Tiam nur parto de la kamparana armeo sub la heroa komando de Ĉen Ŝeng estis defendanta Ĉenhian-gubernion, sed poste, ĝi forlasis Ĉenhian-gubernion kaj translokiĝis al Hiaĉengfu (nordokcidente de la nuna Mengĉeng-gubernio de Anhuj-

provincio) por fari rezistadon. Pro subteno de la tieaj popolanoj, la revolucia situacio pliboniĝis. Sed ĝuste tiam Ĝuang Gia, ĉaristo de Ĉen Ŝeng, perfidis. Tiu senhonta perfidulo ŝtele mortigis Ĉen Ŝeng kaj tuj en la nokto kapitulacis al la imperiestra armeo en Ĉenhian-gubernio.

Kvankam la kamparana insurekcio gvidata de Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang malvenkis post peniga batalo de ses monatoj pro limigitaj historiaj kondiĉoj, tamen ĝi forte skuis la kruelan feŭdan regadon de Kin-dinastio, kaj ankaŭ montris la direkton al la suferplena laboranta popolo. Poste, kamparanoj de diversaj lokoj ribelis unuj post aliaj en la tuta lando, prenante bambuajn stangojn kaj bastonojn kiel armilojn, kaj la regado de la bienula klaso de Kin-dinastio finfine ruiniĝis en tiu ŝtormo.

*La insurekcia armeo de Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang ricevis varman bonvenigon de la popolamasoj.*





# La Silka Vojo tra Azio

**E**N malproksima antikveco silkaĵoj jam estis grava eksporta komerĉaĵo de nia lando. En la tria jarcento a. K. Ĉinio jam famis tra la mondo pro sia abunda produkto de silkaĵoj kaj estis kromnomata kiel "Silka Lando". Sed nur post kiam la eminenta diplomato Ĝang Kian de la Okcidenta Han-dinastio estis sendita al landoj en Okcidenta kaj Centra Azio, la Hinda Duoninsulo, Orienta Eŭropo kaj Norda Afriko, ĉinaj silkaĵoj estis grandkvante eksportitaj al okcidentaj landoj.

En la jaro 138 a. K. Ĝang Kian kiel sendito unuafoje vizitis landojn okcidente de la Pamira Altebenejo kaj starigis interrilaton kun ili.

En la jaro 119 a. K. Ĝang Kian refoje vizitis tiun regionon kun granda delegacio sub sia gvido. Ili kunportis grandan kvanton da oraj moneroj, silkaĵoj k. a. valoraj kiel donacaĵoj. De tiam, tra la vojo interliganta Ĉinion kun okcidentaj landoj


grandaj kvantoj da ĉinaj silkaĵoj estis senĉese eksportitaj, kaj tiu stato daŭris ĝis la meza periodo de Tang-dinastio (618-907 p.K.). Oni skribis, ke en tiu tempo estis du vojoj por trafikado de nia lando kun la Okcidento sude kaj norde de la vasta dezerto Takla Makan laŭ la norda flanko de Kunlun-montaro kaj la suda flanko de Tianŝan-montaro. (Vidu la Skizan Mapon.)

Dum la pli ol mil jaroj de Han-dinastio ĝis Tang-dinastio, tiuj du vojoj estis la ĉefaj trafikaj linioj por transportado de silkaĵoj kaj poste estis nomataj de ĉinaj kaj alilandaj historiistoj "silka vojo".

La trunkaj linioj havis multajn branĉojn. Irano troviĝis ĉe grava loko de la vojo kaj fariĝis pivoto en la komerĉo inter Ĉinio kaj okcidentaj landoj.

En la malproksima antikveco, vere malfacila estis la kreado de la silka vojo longa je dekmiloj





*Silkteksaĵo de Tang-dinastio (618 — 907 p.K.) elfosita en Turfan-regiono de Hingiang en la tempo de 1966 ĝis 1969*

da kilometroj. Por disvolvi la komercon inter diversaj landoj kaj pliigi la interkomprenon kaj amikecon inter iliaj popoloj, aborantaj popolanoj faris sian kontribuon malgraŭ frosto kaj varmego, ŝtormo kaj neĝego.

Tre riĉa estis la enhavo de la komercado kaj kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj en la pasintaj jarmiloj laŭ tiuj vojoj. Krom eksporto de granda kvanto da silko kaj silkaĵo, Ĉinio ankaŭ transplantis multajn vegetaĵojn al najbaraj kaj foraj okcidentaj landoj. La plej famaj inter ili estas persikarbo, abrikotarbo, pirarbo kaj aliaj fruktarboj. Kelkaj fruktarboj estis transplantitaj al Persio, Hindio kaj poste de Persio al Grekio, Romanio kaj aliaj landoj. Hodiaŭ la hindoj ankoraŭ nomas persikon “ĉina frukto” kaj piron “ĉina princo”. Krome ankaŭ multaj ĉinaj kuracaj drogoj estis portitaj al Persio, araba regiono kaj aliaj okcidentaj landoj. Ĉinaj mineraloj estis senĉese transportitaj al Hindio, Persio, araba regiono kaj aliaj landoj. Ankaŭ ĉinaj produktaj teknikoj kiel bredado de silkraŭpoj, ĝisado, farado de papero kaj porcelanaĵoj, preparado de pulvo estis transdonitaj al okcidentaj landoj.

Kaj multaj okcidentaj produktaj teknikoj kaj produktaj teknikoj estis liveritaj al Ĉinio. Famaj hanhjuĉevaloj estis grandnombre enportitaj en ĉiuj historiaj periodoj el Fergana kaj aliaj lokoj. Tiu bona specio de ĉevalo havas gigantan korpon,

maldikajn krurojn kaj dikajn bruston, kolon kaj postaĵon. Delonge ĝi estis konata kiel “milia ĉevalo”. Ankaŭ raraj brutoj kaj birdoj, kiel elefanto, leono, dogo kaj struto, estis portitaj al Ĉinio unuj post aliaj. Medikago kaj vinberarboj estas vegetaĵoj plej frue enportitaj de Ĝang Kian el Fergana. Pli poste, multaj okcidentaj vegetaĵoj estis alportitaj al Ĉinio en diversaj historiaj periodoj. Ekzemple pipro devenis de Hindio kaj granatarbo devenis de Persio. Krome ankaŭ granda kvanto da aliaj vegetaĵoj kiaj olea lino, fabo, kukumo kaj ajlo. Precipe kotonplanto el Hindio havis profundan influon en Ĉinio. Ankaŭ okcidentaj produktaj teknikoj kiel farado de emajlo kaj hinda metodo de sukerpreparado estis alportitaj en Ĉinion.

Sekve de la malfermiĝo kaj disvolviĝo de la silka vojo, pompe disvolviĝis ankaŭ la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj okcidentaj landoj. Multaj okcidentaj artoj kiaj arkitekturo, medicino, muziko, dancarto, literaturo, pentrarto kaj akrobataĵo estis liveritaj al Ĉinio, tiel ke la lasta povis lerni de ili.

La silka vojo estas ne nur komerca vojo tra Azio, sed ankaŭ grava vojo por kultura interŝanĝo inter la Oriento kaj Okcidento. Ĝi montris, ke de antikveco nia lando kaj popolo ne nur havis komercan interrilaton kun diverslandaj popoloj por interŝanĝi bezonaĵojn, sed ankaŭ havis kun ili senĉesan kulturen interrilaton kaj longdaŭran profundan amikecon.



### TROPIKAJ EKONOMIAJ PLANTAĴOJ DISVOLVIĜAS SUR HAJNAN-INSULO

La tropikaj ekonomiaj plantaĵoj sur Hajnan-insulo, Guangdong-provinco, multe disvolviĝis post la Liberiĝo. Nun, sur la insulo, kreskas en vasta areo kaŭĉukarbaro, olepalmoj kutime nomataj kiel reĝo de oledonaĵoj, kaj ankaŭ agavo, piproarboj, kafarboj kun alta ekonomia valoro kaj aliaj tropikaj fruktaj arboj kaj plantoj.

Antaŭe nur kelkaj privataj kaŭĉuk-ĝardenetoj troviĝis sur Hajnan-insulo. Post la Liberiĝo, la ŝtato organizis teknikajn fortojn por fari enketadon pri la riĉfontoj de tropikaj plantaĵoj sur la insulo, kaj

*Gelaboristoj de la Ŝtata Hinglong-kultivejo de Transmaraj Ĉinoj sur Hajnan-insulo kolektas gumon de kaŭĉukaj arboj.*



starigis sinsekve nombrojn da ŝtataj kultivejoj por kulturigi laŭplane kaŭĉukarbojn kaj aliajn tropikajn ekonomiajn plantaĵojn. Lokaj popolkomunumoj aktive disvolvas krom tiu de grenoj ankaŭ la produktadon de tiaj plantaĵoj. Dum la lastaj jaroj, la produktokvanto de lamena kaj krepa kaŭĉuko, agava fibro, palma oleo, aromadona oleo kaj aliaj senĉese altiĝis kaj la insulo provizis nian industrion per ĉiam pli multa materialo.

### LA KULTURA VIVO DE DIVERSNACIECAJ POPOLANOJ DE JILI

En Jili-a Kazaĥa-nacieca Aŭtonoma Subregiono norde de Hingiang loĝas 13 naciaj malplimultoj inkluzive de la naciecoj kazaĥa, ujugura, sibo-a kaj uzbeka. Tiuj naciecoj estas fame konataj pro sia kantemo kaj dancemo. Nun en popolkomunumoj kaj multaj produktaj brigadoj starigis amatorajn artajn trupojn kaj diversajn artajn kaj sportajn aktivadojn ofte okazas en paŝtejoj kaj vilaĝoj. Oni okazigas kantodancan vesperon ne nur en festotago aŭ ripoztago, sed ankaŭ post produktado. Kulturaj domoj pli kaj pli multiĝis, kaj tie oni povas legi gazetojn, ĵurnalojn kaj librojn en kelkaj naciecaj lingvoj. Kaj formiĝas ankaŭ la retoj de filmoprojekciado kaj disaŭdigo en vilaĝoj kaj paŝtejoj.

Direktate de la principo pri literaturo kaj arto elmetita de Prezidanto Maŭ "Florcent floroj, novo elvolviĝu el malnovo", la tradicia amuza aktivado sur Jili-stepo ricevis novan disvolviĝon dum la lastaj jaroj. La kazaĥaj popolaj artistoj aktivadas sur la stepo prezentante kantojn kaj muzikojn kun originala nacieca stilo. Ili aktive verkis novajn kantojn laŭdantajn Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de la diversaj naciecoj, kaj la hodiaŭan novan vivon. Krome, ili faris senĉesan renovigon al la malnova arta formo, elvolvante el la sola formo de kantado sub muzikila akompano en formoriĉajn artaĵojn kiaj dialogo kun kantado, konkursa kantado, solo, kanto kun gestado, gedueto, kantado sub dombra akompano kaj aliaj kun novaj melodioj bonvenigataj de la amasoj.

## NOVAJ LOĜEJOJ POR LABORULOJ EN PEKINO

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la pekina popolo faris la konsuman urbon Pekinon produkta urbo. La totala konstruareo de novaj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj, hospitaloj, magazenoj, lernejoj, ekspoziciejoj, restoracioj k.a. egalas al 2.5-oblo de la malnova Pekino. La loĝantoj preskaŭ duobligiĝis. Kun la rapida disvolviĝo de la socialisma konstruado, la popola registaro konstruis, rekonstruis kaj riparis loĝejojn laŭplane, kaj la loĝkondiĉoj de la laborantaj popolanoj estas iom-post-iom plibonigataj.

Ĉ. 2,000,000 laboristoj, vendistoj, kadroj kaj intelektuloj de pli ol 600,000 familioj transloĝiĝis en novajn loĝejojn kun 22,000,000 kvadrataj metroj. Plejparto de ili estas laboruloj, kiuj vivis mizere en la malnova socio kaj loĝis en kadukaj kabanoj, multaj el ili eĉ ne havis hejmon.

Samtempe, la koncernaj ŝtataj administracioj malkonstruis por 55,000 laborulaj familioj kadukajn domojn kun pli ol 80,000 ĉambroj kaj transloĝigis ilin en 120,000 novaj ĉambroj de la rekonstruitaj etaĝdomoj.

La novaj loĝejoj konstruitaj en Pekino estas administrataj de la ŝtato. La lokaj administracioj de loĝejoj respondecas pri la riparo de akva aŭ elektra ekipaĵoj kaj aliaj.

## SUKCESO DE ĈASADO

Nia lando donas bonan kondiĉon al ĉasado per riĉa fonto de sovaĝaj bestoj. Laŭ nekompleta statistiko pri 20 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj inkluzive de Hejlonggiang, Gianghi, la Interna Mongolio, Hunan, Guanghi, Junnan k. a., la feloj de ŝovaĝaj bestoj aĉetitaj de la ŝtato en la unua duono de la kuranta jaro plimultiĝis je 55 procentoj ol tiu en la sama periodo de 1971. La sovaĝaj birdoj kaj bestoj aĉetitaj de la ŝtato komence de la vintro de 1971 en Kinghaj, Ŝenhi, Ŝanhi kaj Gansu plimultiĝis respektive je 188 procentoj kaj 282 procentoj ol tiuj en la sama periodo de la pasinta jaro. La aktiva disvolviĝo de ĉasado en diversaj lokoj multigis la enspezon por la kolektivo, liveris al la ŝtato grandan nombron da feloj, viandoj, drogoj, porrigardaj bestoj, kaj ankaŭ eliminis minacon de sovaĝaj bestoj kaj akcelis la disvolviĝon de agrikultura kaj paŝta produktado.



*Popolanoj de la Olunĉuna Aŭtonoma Hoŝo de Hejlonggiang-provinco en ĉasado kaj patrolado por protekti arbarojn.*



### SKRIBIS JAPANA LEGANTO E. I.

Ni havas grandan ĝojon sendi niajn plej sincerajn salutojn al vi kaj, pere de vi, al la respektata ĉina popolo, inkluzive de la ĉina esperantistaro, okaze de la amika akceptiĝo de la japana ĉefministro kun la akompanantaro al via ĉefurbo. Per la televido ni kun emocio rigardis la scenojn, en kiuj la homa bonvolo montriĝis plej altgrade. Ni estas certaj, ke komenciĝis jam la unuaj paŝoj de vere amika interrilato inter Ĉinio kaj Japanio, interrilato, kiu longlonge daŭros kaj disvolviĝados spite de eblaj malfacilaĵoj.

### SKRIBIS ĈEĤOSLOVAKA LEGANTO J. J.

Mi tre dankas por la sendo de viaj revuoj. Ili tre plaĉis al mi pro pluraj kialoj. La artikoloj estis interesaj. Per ili mi ekkonis viajn landon kaj popolon, viajn noblajn ideojn kaj klopodojn. Tio memkompreneble tre imponas al la ano de malgranda nacio.

### SKRIBIS JAPANA LEGANTO M. M.

Ni, anoj de Rondo Harmonia, gratulas vin, la ĉinan popolon, pro unua paŝo al amikeco inter Ĉinio kaj Japanio kaj establo de diplomatia rilato post malamikeco.

Ĉe tiu ĉi realiĝo de amikeco ni dankas vin pro via favoro.

Ni ĵuras, ke ni neniam forgesu pasintan krimon de japana mili-

tismo, sed ni kredas ke ni devas grandigi amikecon inter plej proksimaj popoloj.

### SKRIBIS JUGOSLAVA LEGANTO F. P.

Nun iomete pri la gazeto kaj ĝia enhavo: La gazeto teknike estas tre belaspekta, sed ĉefa estas ĝia enhavo. El la enhavo oni povas vidi progreson de la lando. Vidante nur la ilustraĵojn, oni multon ekscias pri Ĉinio, precipe vidante serenajn vizaĝojn sur fotografaĵoj precipe koloraj oni konkludas ke la popolo estas por progresigo, kaj tia popolo certe venkos. Krom ilustraĵoj artikoloj kompletigas kaj klarigas ĉion.

Do finfine la gazeto tre plaĉas al mi kaj mi ne dezirus resti sen unu numero.



## Ĉinaj Orfiŝoj

**M**ULTAJ el la homoj kiuj vidis ĉinajn orfiŝojn diris, ke ili estas pli amindaj ol la tropikaj fiŝoj por akvario kun strangaj formoj kaj brilaj koloroj. Kaj ili altiris al si atenton de zoologoj pro tio, ke novaj specioj de ili senĉese aperas sub bredado de homoj.

### KIEL ILI ORIGINIS?

Oni skribis en antikva libro, ke en la periodo 968-975 p.K. orfiŝoj jam aperis en nia lando.

La unuaj orfiŝoj estis produktitaj en Ĝeĝiang-provinco, kaj nur en la 16-a kaj 17-a jarcentoj orientaj kaj okcidentaj landoj ricevis importitajn orfiŝojn el Ĉinio.

La prapatro de orfiŝo estas sovaĝa karaso arĝente griza. Sub influo de la medio dum la kreskado de karaso, la nigraj ĉeloj de ĝiaj skvamoj malaperis iom post iom, dum oranĝaj ĉeloj pli kaj pli multiĝis kaj fine fariĝis la t.n. ora karaso en flave-ruĝa koloro. Tio estas la origina speco de orfiŝo.



## ŜANĜIĜO DE LA KORPO KAJ KOLOROJ

La ora karaso devis trairi longan ŝanĝigon por fariĝi la nuna orfiŝo. La ŝanĝiĝo okazis unuflanke pro la influo de la medio sub homa bredado, aliflanke pro hibridigo kaj selektado.

Post kiam orfiŝo fariĝis objekto de belo, ĝi vivas en malvastaj vazoj kaj akvarioj anstataŭ baseno, kaj la nova medio kaŭzis ŝanĝigon de ĝia korpo. Antaŭ ĉio, ĝia plata spindeloida korpo taŭga por rapida naĝado, iom post iom mallongiĝis kaj dikiĝis por akomodigi al la malvasta ujo. Por teni ekvilibron de la korpo mallonga kaj dika ĝi bezonis longan kaj larĝan voston, sekve la vosto fariĝis duobla, triobla kaj eĉ kvarobla. Post kiam la vosto fariĝis ekvilibrigilo, la fiŝo devas sin movi ĉefe per la naĝiloj sur la brusto kaj sub la ventro, sekve ankaŭ tiuj organoj disvolviĝis.

Poste, pli kaj pli multiĝis la specoj de orfiŝoj dank' al selektado kaj hibridigado fare de la bredistoj. Koncerne al la ŝanĝiĝo de la formo de la kapo, aperis la orfiŝoj Leonkapo kaj Tigrokapo, kies kaphaŭto turniĝis en tuberon kovrantan la vangojn kun la okuloj kaj buŝo enkaviĝintaj en ĝin, Anserkapo kaj Altkapo kun tubero sur la kapo, Rankapo kun triangula kapo kaj Muskapo kun kapo malgranda kaj pinta. Koncerne al la ŝanĝiĝo de la okuloj, aperis Drakokulo kun grandaj kaj elstaraj okuloj, Suprenrigarda Okulo kun pupiloj supren direktiĝantaj kaj Vezikokulo kun vezikaj okuloj kaj malgrandaj pupiloj. Krome, sin trovas ankaŭ orfiŝo kun eksteren turnitaj brankokovriloj kaj orfiŝo Velura Globo kun multe disvolviĝinta nazmembrano, elstariĝinta el naztruoj. Kristal-skvamulo

kaj Perlo-skvamulo ricevis siajn nomojn pro siaj belaj skvamoj. Tre variaj estas la naĝiloj kaj vosto de la orfiŝoj, inter la plej oftaj sin trovas nigra, blua, purpura, purpura-blua, bludesegna, bunta, ruĝa-blanka, vitreca, retdesegna, ruĝa, oranĝa kaj arĝenta.

## KLASIFIKADO

Laŭ takso, nun troviĝas pli ol 100 specoj de orfiŝoj. Ili estas dividitaj en kvar grupoj laŭ iliaj formoj.

1. Ora Karaso kun mallarĝa korpo kaj ordinara vosto;
2. Forka Orfiŝo kun dika mallonga korpo, grandaj naĝiloj, disbranĉiĝintaj vosto kaj plataj okuloj;
3. Draka Orfiŝo kun elstaraj okuloj kaj grandaj naĝiloj;
4. Ova Orfiŝo kun ovoforma korpo sen dorsa naĝilo.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, dank' al zorga flegado de la bredistoj elkulturiĝis pli multaj novaj specoj de orfiŝoj kun bela korpo en neordinara koloro. Inter ili sin trovas orfiŝo kun arĝenta korpo kaj ruĝa makulo sur la kapo simila al ruĝverta gruo, Nigra Drakokulo kun tute nigra korpo simila al veluro naĝanta en akvo, kaj Perloskvamo kun rondaj skvamoj similaj al belaj perloj. Tiuj famaj specoj estas aparte admirataj de la rigardantoj kaj en la ĉiujare printempa kaj aŭtuna foiroj de ĉinaj eksportaj varoj en Kantono ili plaĉis al multaj eksterlandaj amikoj.



## Sur la Kovrilo:

Jenzengvanggie, sekretario de la partia filio de Liemaj-popolkomunumo, avangarda unuo de Tibeto en lernado de Daĝaj

## Sur la Dorskovrilo:

Antaŭurbo de Lasao

### KOREKTO

Anstataŭ “militaj rekompencoj” en la 5-a punkto de “Komuna Deklaro de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Registaro de Japanio” en la aldono al n-ro 12, 1972 kaj anstataŭ la titolo sur pĝ. 10 en la sama n-ro legu respektive “militaj kompensoj” kaj “Nadmu-foiro sur Stepo”.



# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro I (174) 1973

## Ĉefa Enhavo

Tibeto — Firsto de la Mondo.....	1
Antaŭe Servutuloj, Hodiaŭ Mastroj.....	7
Sur la Granda Vojo.....	11
La Tibeta Industrio Komencita de Nulo.....	15
Pionira Trupo sur Altebenejo .....	20
Bonodoras Fruktoj en Tibeto .....	21
Nova Fizionomio Ambaŭborde de Ginggiang-rivero.....	22
Hehengĉeng-brigado Mem Fabrikas Agrikulturilojn.....	26
Generalo — Kamparano.....	29
Neforgesebla Amikeco .....	33
Vivu la Amikeco inter la Popoloj de Ĉinio kaj Laoso .....	35
Firma Subteno al la Justa Propono de la Latinamerikaj Landoj.....	38
Greno ( <i>novelo</i> ) .....	43
Kanto pri la Socialisma Patrio ( <i>kanto</i> ).....	46
Ĉen Ŝeng kaj Vu Guang — Gvidantoj de Kamparana Insurekcio .....	48
La Silka Vojo tra Azio .....	50
Ĉinaj Orfiŝoj .....	54

# Orfiôoj

